

Sennacieca REVUO



samo dirite
Organo de la
Tutmonda Laboristaro

Antaŭe
Esperantista Laboristo

Ni metu esperanton je
la servo de niaj klasaj
profitoj.

Jara abono: Anglio, 5 ŝil.; Aŭstrio, 150 kr.; Belgio kaj Francio, 9 fr. fr.; Bulgario kaj Rumanio, 30 lev.; Ĉekoslovakio kaj Jugoslavio, 25 kr.; Danio, Norvegio kaj Svedio, 6 kr.; Germanio kaj Finnlando, 25 mk.; Hispanio kaj Portugalio, 7 pes.; Hungario, 60 kr.; Italio, 12 lir.; Nederlando, 3 g.; Polio, 300 mk.; Svisio, 6 sv. fr.; Usono, 1 1/4 dol.
Oni pagu prefere per monbiletoj aŭ bankĉekoj. — La abonoj komenciĝas en Januaro kaj Julio.

REDAKCIO: **E. LANTY**

24, Boulevard Beaumarchais — PARIS (Francio)

ADMINISTRACIO: **L. GLODEAU**

177, Rue de Bagnolet — PARIS (Francio)

Postkongresaj Pripensoj

Forpasis jam kelkaj monatoj de kiam okazis en Praha la 1^a Kongreso de S. A. T. El diversaj lokoj nun alvenas novaj aliĝoj kaj informpetoj. Ĉar nia entrepreno respondas al ĝenerala deziro tial ĝi certe kreskos kaj disvolviĝos. Sed ni devas atenti, ke tiu disvolviĝo ne okazu senorde, hazarde, sencele. Multanara asocio ne havanta precize difinitan kaj atingeblan celon estas nur maltrafema organismo baldaŭe mortonta. Tion ni evitu se ni volas, ke nia penado ne estu senfrukta.

La celo de S. A. T. estas difinita en la Statuto; kaj la Rezolucio *ĉiuvoĉe* akceptita, fine de la Kongreso, montras la vojon sekvendan. Tamen ŝajnas al mi necese, hodiaŭ klarigintence pritrakti kelkajn punktojn de nia kongresa ellaborajo.

Unue mi rememorigu, ke la nure esperantlingva afero estas por ni sencela. Ni konsideras internacian lingvon kiel nepre bezonatan ilon, kiun ni devas meti je la servo de niaj politikaj celoj. Ni forte konscias, ke esp.o en la manoj de niaj kontraŭuloj neniel utilas al ni. Sed, aliparte, ni ne malpli forte sentas, ke iu ajn Internacio ne povas sukcese ekzisti, tiel longe ĝis ties membroj ne povos interrilatiĝi alie ol pere de siaj ĉefoj.

La du ĉi-lastajn asertojn mi konsideras nerefuteblaj. Ĝis nun almenaŭ neniu rebatis ilin. Nia esperantisteco estas do nur logika konsekvenco de niaj politikaj konvinkigoj.

Tamen oni ne miskomprenu min: Mi ĝojas, kiam esp.o sukcesas en la rondoj de niaj kontraŭuloj; neniel mi volus malhelpi al la disvastigo de nia lingvo ĉe la plej egaj reakciuloj. Mi scias, ke sennacieca lingvo kaŝentenas povon

revolucion. Sed mi scias ankaŭ, ke tiu povo estas multfoje pli granda se ĝi estas en la manoj de revoluciuloj. Ni perfidas niajn klasajn interesojn ĉiufoje kiam ni foruzas energion en eksterklasa direkto. Tial, nia urĝa kaj sola tasko estu trudi esp.on al la Internaciistaro.

Nun preskaŭ ĉiuj internaciistoj konsentas, ke internacia lingvo estas nepre necesa; sed ili diras; «Esp.o ne povas tuj utili al ni; estas taskoj pli urĝaj, kiujn ni devas plenumi; faru ni unue la revolucion kaj poste ni okupiĝos pri la mondlingva afero». Tia diro estas rebatebla nur per faktoj. Ni devas pruvi, ke nia lingvo povos jam esti utila. Ni devas klopodi tiamaniere, ke baldaŭ ni povos en la sekcioj de nia Partio, en niaj sindikatoj, en iu ajn el niaj grupoj, montri ke esp.o taŭgas por peti kaj ricevi informojn, por faciligi vojaĝojn, por okaze helpi al kontraŭleĝa agado k.t.p.

Esperanto estas efektive jam sufiĉe disvastigita por ke ni povu eltiri ties tiucelan profiton. Aristataŭ kolekti informojn por komercistoj aŭ diverspecaj kolektantoj, la „Satanoj“ dediĉu sian tutan energion al interŝanĝado de sciigoj pri la revolucia movado en la tuta mondo. Senĉesa interrilatado estiĝu inter la anoj de S. A. T. — Tiam kaj nur tiel, ili fariĝos la plej perfektaj el la internaciistoj, kiel estas aludite en la Statuto.

S. A. T. celas ebligi tian tutmondan interrilatiĝon. Ĝi estas *porpraktika* organismo. Tial al ĝi nur aniĝu Kamaradoj bone scipovantaj la lingvon, kaj pretaj ĝin praktiki por la ĉi-supre diritaj celoj. S. A. T. ne devas celi senrezerve al multanareco; ĝi preferu la kvaliton de la membroj ol la kvanton.

*

Kelkaj Kamaradoj emas konsideri S. A. T. kiel *porvarban* organismon, dum ĝi devas esti nur *porpraktika*. Dronante

en rutino ili estas influataj de tiu fakto, ke, ĝis nun, oni vidis nur kuniĝon de naciaj asocioj. Oni ne sufiĉe atentis, ke nia movado havas tute specialan karakteron al kiu ni devas konformiĝi, se ni volas trafi la celon. Porvarba organismo povas esti nur loka, regiona aŭ landa, dum porpraktika nepre devas esti supernacia, tutmonda.

Kamarado K. D., el München, reprezentas tiun tendencon. En artikolo, kiu troviĝas sur alia paĝo, li diras ke *Germana Laborista Esp. Asocio* devas enkadriĝi en S. A. T. tial ke ankaŭ ĝi celas „praktikan uzadon de Esp.o.“ Tute precize mi ne konas la regularon de tiu Asocio, tamen mi senhezite diras, ke enlanda organizaĵo ne povas logike havi kiel celon la praktikadon de internacia lingvo. Kiam oni parolas esperante kun siaj samlandanoj oni ne utiligas esp.on, oni nur sin ekzercadas en la lingvo. La utiligo de internacia lingvo povas esti nur eksterlanda. Tial la enkadriĝo de porvarba organismo en S. A. T. povas nur kaŭzi konfuzon, mistrafekon.

Kompreneble, mi ne opinias, ke porvarba organizaĵo estas senutila. Nur la enlandanoj povas prijuĝi tiun aferon, kaj mi ne volas enmiksiĝi en tian debaton. Mi persiste asertas nur, ke ni devas apartigi, specialigi nian agadon; la porvarba kaj porpraktika taskoj devas esti tute difine limigitaj. Nur tiel ni atingos rezultaton, dum se ni agas en konfuzo, sur nelimitita kampo ni falos en bedaŭrindan haoson.

La diro, ke ni ne povas kvazaŭ lukse havi du asociojn estas absolute netrafa. Se konfuzmaniere oni intermiksas la porvarban kaj porpraktikan taskojn per la kreo de „propagandaj komisionoj“ en la kadro de S. A. T., kiel proponas K. do K. D., estos ankaŭ necese, ke tiuj komisionoj havu monrimedojn por sia propagando. La rezultato, laŭ mona vidpunkto, estos la sama. Ĉu oni pagu po 10 Mk. ekzemple, al du organizaĵoj, aŭ 20 Mk. al unu sola, la monujo ambaŭokaze malpleniĝos samkiome — kaj ni gajnos nur konfuzon kaj netrafekon.

*

Aliaj K. doj inklinas konsideri S. A. T. kiel nure politikan organismon. La anarkiistoj volus ke ĝi estu pure anarkia, la komunistoj, pure komunista, k.t.p. Tia spiritstato ŝajnas al mi ankaŭ rutina, antaŭjuĝa. Ĉi estas rezultato de agado en niaj politikaj rondoj, kie ĉiu opinias esti en la ĝusta vojo, dum la anoj de iu grupo alitendenca estas konsiderataj kiel erariĝantoj. Kompreneble estas tute logike, ke personoj malsame opiniantaj pri la vojo sekvenda ne kunvojaĝu. Sed ĉu do ĉiuj revoluciaj esperantistoj ne samopinias pri unu punkto, nome, ke esp.o devas esti utiligata por revoluciaj celoj?

En U. E. A. oni tute ne interkonsentas pri la ĉi supre dirita celo. Tamen oni vidas, ke severaj komunistoj eĉ konsentas esti delegitoj de tiu organizaĵo (kaj ili ne estas la malpli sindonemaj). Ĉu do estas plimalfacile por ko-

munisto kaj sindikatisto, ekzemple, interkonsenti pri difinita celo en S. A. T., ol por framasono kaj katoliko en U. E. A.? Mi opinias, ke estas pli facile, precipe se ambaŭflanke oni konsideras ke la politikaj organizaĵoj estas kreitaj por politiki, kaj S. A. T. por praktiki esp.on.

Estas ĉiam la sama afero: oni apartigu la taskojn. Por politiki oni iru en sian politikan rondon; por batali kontraŭ la ekspluatado de la mastroj oni aniĝu sindikaton, kaj por praktike uzadi internacian lingvon oni envenu Satanion! . . .

Anarkiano, komunisto, socialisto estas samcelanoj, kvankam ne samvojirantoj. Vole nevole, en multaj okazoj de la sociala batalo ili kunagadas. Ĉiu povas trovi mem ekzemplojn, kiuj pravigas tiun aserton. Konsiderante la mondlingvan aferon, ĉu do ĉiuj revolucianoj ne havas la saman intereson pri la sukceso de esp.o en iu ajn el la konkurantaj Internacioj?

Cetere, se oni konsideras la nombron de esp.istoj en la mondo, oni tuj vidas, ke estas neeble utilige funkciigi tutmondan asocion, kies membroj estus nur ĉu anarkianoj, ĉu komunistoj, k.t.p. Tial estas dirite en la Rezolucio:

Konsiderante: a) ke la ĉefa tasko de nia Asocio povas neniel esti politika, ĉar jam ekzistas klasbatalaj organizaĵoj; b) ke samkiel antaŭ 20 aŭ 30 jaroj estis nepre necese, ke ĉiuj praktikantoj de esp.o — ĉu pastroj, ĉu anarkiistoj, ĉu policanoj — ariĝu por montri per faktoj, ke artefarita lingvo povas esti uzata en la praktikado, estas nun necese, ke ĉiuj esp.istoj, anoj de diversaj klasbatalaj organizaĵoj, ariĝu en unu solan asocion por montri al la proletariato per imponaj faktoj kiom utiliga esp.o estas por la batalo kontraŭ la kapitalista sistemo.

Eble venos la tempo, kiam esp.o estos tiom disvastigata, ke la komunistoj aŭ la anarkiistoj esperantistaj povos tiam tute apartigi sian agadon. Sed nun ne estas tiel. Ni do ne solenu la festojn antaŭ ilia dato. Ni atentu pri la faktoj. Agante alie ni montrus nur bedaŭrindan spiritstaton de fanatikuloj, de fantaziaj teoriuloj nekapablaj vidi per la okuloj de la racio kaj juĝi objektivite. Tiaj homoj ne devas esti la „Satanoj“.

Jam tro longa estas tiu artikolo. Tamen mi volas finaldone citi ankoraŭ frazon el nia gvidila Rezolucio: b) . . . la sperto jam montris, ke U. E. A. estas la sola organizaĵo, kiu en la praktiko montriĝis fruktodona; c) Sed ke ĝia politika neŭtraleco malpermesas, ke ĝi povu efike labori sur nia proletaria kampo . . .“

S. A. T. fariĝu la U. E. A. de la Revoluciularo!

E. LANTY.

Ellernu la lingvon!

MALESPERA KRIO

LA HISPANUJA LABORISTARO AL SIA TUTMONDA KAMARADARO

Ni vivas sub la regado de l' plej maljusta tiraneco. Nia situacio estas tragedia. La doloroj kiujn ni sentas superstaras ĉion imageblan.

Niaj organizaĵoj estas plene disigitaj. Niaj kamaradoj, la plej bonaj, la plej fortaj, la plej abnegaciaj, estas enkarcerigitaj, ekzilitaj aŭ perfide mortigitaj. Bando de perfidmortigistoj plenumas ĉiuhore, ĉiumomente la ordonojn al ĝi konfiditajn. Ne forpasas tago sen surstrata mortfalo de unu el niaj kamaradoj.

La krimea malbonegeco de la mortigistoj atingas terurigitajn limojn. Unue ili nur enkarcerigis niajn kamaradojn. Kiam la karceroj ne povis enloĝigi iun plu, tiam ili elpensis la ekziladon.

Kunkubute ligitaj, formante vicon de dek, dudek, tri-dek homoj, eliris niaj kamaradoj el karceroj por piede trairi ĉiutage tridek aŭ kvardek kilometrojn kaj eniri alian karceron, k. t. p. La naciaj ĉefvojoj estis plenaj de tiuj vicoj da kaptitoj kiuj suferis la krudajn rigorojn de l' malvarmo, de l' malsato kaj la vipadojn de la civilgvardianoj. Ĉi tiu fiagado ne sukcesis malaperigi la kuraĝon, la fidon kaj la entuziasmon de la revoluciemaj batalantoj. Ĉiuj suferoj eltenitaj plivigligis ankoraŭ ilian amon por la celo kaj ardigis pli forte en ilia brusto la malamon al klaso kaj al homoj, kiuj estis atingantaj la elrafinadon de siaj malbonegecoj.

Kiam la ekzekutistoj vidis ke per ĉi tiuj turmentadoj ne povas senkuraĝigi la spiriton de la revoluciemuloj, tiam ili adoptis la perfidmortigon. Niaj fratoj falis kun la kranio traborita per la kugloj de la reakcio. Ili kredis ke la timego ekkaptus la malmultajn, kiuj restas liberaj kaj ke la laborista movado estus ekstermita por ĉiam. Sed la monstra agado helpis plialtigi la penon de tiuj, kiuj ne estis ankoraŭ falintaj. La indigno ekbrulis en la animo de tiuj, kiuj ne estinte ankoraŭ viktimoj estis atendantaj heroe la horon de l' suferadoj.

La krueleco plistreĉiĝis. Ĉe la komenco oni mortigis per pafoj. Ŝajnis al krimuloj ke tio estas malgrava. Estis necese elpensi pli teruran procedon. Estis necese amuziĝi per la suferado de la viktimoj. Estis necese ilin turmenti, elŝiri ilian karnon, elartikigi iliajn ostojn, trabori ilian kranion per tranĉilegatoj. Kaj tio estis kaj estas malvarme farata.

La inkviziciaj turmentoj renaskiĝas.

Noktomeze oni liberigis la malliberigitajn por tuj ilin mortigi. Sur aliaj konstante flirtas la minaco pri „liberigo“ estanta la promeso je ilia certa mortiĝo. Al aliaj oni intencas enŝpruci venenojn por ekstermi ilin malrapide, por ke ilia morto ŝajnu natura.

Ĉi-tie en Hispanujo niaj suferoj ne havas ĉhon. La burgularo ridetas pro kontentiĝo kredante, ke ĝi estas prempatiginta por ĉiam la danĝeron je sia renversiĝo. Inter la intelektuloj leviĝas neniun krio kiel tiu de Tolstoj „mi ne povas silenti!“ kiu tremigis la tutan Eŭropon. Elmetite en la plej profunda indiferento ili vidas la laboristan

klason traŭranta la amason de ĝiaj doloroj kaj el sia brusto eliras nek la plej mallaŭta bedaŭro, nek la plej humana malbondiro.

Ni estas solaj, tute solaj, batalante kontraŭ malamiko kiu ĵuris nian ekstermigon. Eŭropaj Fratoj, tutmondaj kamaradoj, helpu nin!

Oni nin mortigas, oni ekstermas nin! Ni rajtas esperi de vi. Vi devas nin helpi.

Ni esperas ke vi ne rigardos nekortuŝeble la malaperon de legio da batalantoj kiu ĵuris milfoje morti antaŭ ol humiliĝi sub la volon de la tiranoj.

La Tuthispanuja Konfederacio DE L' LABORO.
Tradukis Liber.

1922

Ĉu ni bondeziru la legantaron? Tio estus senefika, do vante nebezona. For la hipokritan tradicion! . . .

Ĉu ni malantaŭen rigardu por vidi la laboron faritan dum la pasinta jaro? Tian zorgon ni lasu al niaj legantoj. Ni nur prizorgu la estontecon.

1921 vidis la 1^{an} Kongreson de la Esperantista Revolucianaro. En Praha la bazoj de sukcesonta organizaĵo estis starigataj. S.A.T. kreskas malgraŭ skeptikeco kaj indiferenteco de kelkiuj.


La 650-membra kerno jam posedas altirigpovon, kapbla kontraŭbatali la obstaklojn. Por la sukceso de nia entrepreno ni deziras nur, ke ĉiu esperantista proletario plene konsciui pri la profito de sia klaso. Ĉiu dediĉu sian tutan energion por la kreskigado de la 1^a proletaria tutmonda organizaĵo esperantista.

Kaj se oni nepre deziras, ke ni eldiru bondeziron, nu, jen: La «dianoj» ne kapablis feliĉigi la mondon. Tio estu do la tasko de la »satanoj».

La mondo fariĝu granda Satanio! . . .

Sennacieca Revuo





LA profesia laborista movado en Polio ⁽¹⁾

Antaŭ 1919, la pola profesia laborista movado prezentis sekvantan bildon: stato de malaktiveco en antaŭa rusa Polio, konstanta sed malforta disvolviĝo en la aŭstria Polio, fine kompleta malapero de klasaj unuiĝoj en la antaŭa prusa Polio. Ĉi tiu situacio klariĝas per la malsamaj kondiĉoj de politika vivo en ĉi tiuj tri diversaj partoj, je kiuj estis dividita Polio. En la antaŭa rusa Polio, lando de granda industrio, la profesiaj unuiĝoj estis viktimoj de bruta kaj sistema represado ⁽²⁾ de la carisma registaro. Tamen nek la malliberejo, nek la ekzilo en Siberion de la ĉefoj de l'movado aŭ eĉ de ĉiuj membroj de unuiĝaj oficejoj, kiel ekz. okazis ĉe la teksistoj kaj metallaboristoj, ne povis komplete sufoki la disvolviĝon de la unuiĝoj. Sed la profesiaj organizaĵoj, ne povante plu agi en libera aero, devis transformiĝi en sekretajn organizaĵojn, kio metis baron al ilia disvolviĝo kaj enkondukis ilin en staton de absoluta malaktiveco. Ili povis grupigi nur kelkajn milojn da membroj: tio ĉi estis maksimuma nombro, kiun ili povis atingi en similaj kondiĉoj de ekzisto.

En la antaŭa aŭstria Polio, la represado estis malpli bruta kaj antaŭ ĉio malpli sistema. En 1905—1906, kiam la laborista movado atingis jam certan gravecon, la regantaj aŭtoritatoj komencis ĝin ĉikani, sed ili ne penis ĝin detruji kaj ne uzis la procedojn de la rusa registaro.

La ekzemplo de la antaŭa prusa Polio plej bone montras la kaŭzojn, kiuj igas la laboristan movadon postuli praktikan aplikon de la principo de libera decido de la popoloj pri sia sorto. En tiu ĉi atmosfero de nacia persekutado, en tiuj ĉi kondiĉoj de elnaciigo, kreitaj de la prusa politiko en ĝia lukto kontraŭ la pola elemento, ne povis plu ekzisti loko por vastampleksa socialista profesia movado. Por defendi sian polan naciecon, la polaj amasoj devis sin rifuĝi sub la ŝirmo kaj protekton de naciistoj kaj pastraro. Ili vive organiziĝis, sed ilia labo-

rista organizaĵo havis forte naciistan karakteron. Ĝi koncernas la socialistan organizaĵon, ĝi ne povis disvolviĝi; ĝi restis simpla grupo de propagandistoj, kies agado estis krom tio malhelpata per la sinteno de la germana socialdemokratio, nekapabla kompreni la realan situacion de la polaj laboristoj, submetitaj al la jugo de Prusio.

En la du lastaj monatoj el 1918 kaj la unua duonjaro el 1919 la situacio ĝisfunde ŝanĝiĝis. La organizaĵoj, kiuj jam ekzistis, ekvidis, kiel grandaj amasoj de laboristoj enskribiĝis kiel novaj membroj. Unu el la proklamoj de la Pola Registaro garantiis al la profesiaj unuiĝoj plenan liberecon de agado kaj disvolviĝo; unu el la dekretoj donis al ili laŭleĝan ekziston. Komence de tiu ĉi momento, novaj organizaĵoj fondiĝas preskaŭ ĉie; baldaŭ ili penas grupiĝi; la celado al centralizo ekregas la movadon, kaj tiamaniere naskiĝas profesiaj organizaĵoj, ampleksantaj tutan Polion. Samtempe en la antaŭa prusa Polio, oni vidas, kiel la profesiaj unuiĝoj organiziĝas sur la bazo de klasbatala programo, restante tamen sendependaj de la cetera lando. Ili rapide akiris la konfidon kaj apogon ĉe la laboristaj amasoj. La profesia movado ĉiam pli progresas kaj la 31. decembro 1919, ĝi jam kalkulas 333 735 membrojn. Ĉi tiu cifero enhavas nur la unuiĝojn aliĝintajn al la Centra Komisiono de klasaj profesiaj unuiĝoj; ĝuste ili formas la bazon de la movado. Ekster la Komisiono staras ankoraŭ la unuiĝoj de hebreaj laboristoj, partigitaj je tri diversaj tendencoj, la profesiaj unuiĝoj de antaŭa prusa Polio kaj kelkaj lokaj klasaj organizaĵoj.

Por doni bildon pri la movado kiel ĝi prezentiĝis en tiu epoko, ni publikigas ĉi tie la oficialajn ciferojn kolektitajn de la Labora Ministerio, kiuj montras la dispartigon je la 1. septembro 1919 de la organizitaj laboristoj inter diversaj unuiĝoj.

Klasaj unuiĝoj	566 402 = 58,7 %
Polaj unuiĝoj ⁽¹⁾	297 776 = 30,9 %
Kristanaj unuiĝoj ⁽²⁾	35 836 = 3,7 %
Diversaj unuiĝoj ⁽³⁾	64 630 = 6,7 %

Kiel ni vidas laŭ la supraj ciferoj, la disvolviĝo de la profesia movado en 1919 progresis multe pli rapide ol ĝia centralizo. La Centra Komisiono, kreita sekve de la konferencoj inter diversaj unuiĝoj, altiris nur 334 000 membrojn, kompare kun la tuta kvanto de 556 000 laboristoj apartenantaj al profesiaj unuiĝoj. En la fino de 1919 apenaŭ dek unuiĝoj etendis sian agadon sur la tutan lan-

(1) La materialo por ĉi tiu artikolo estas al ni liverita de k-do Z. Zaremba, redaktoro de »Związkowiec«, organo de Centra Komisiono de klasaj profesiaj unuiĝoj (france: sindikatoj) en Polio.

Ni petas niajn legantojn publikigi la tradukojn de tiu ĉi artikolo en lokaj laboristaj gazetoj kaj sendi ekzemplerojn al nia redakcio.

(2) punhaltigo.

(1) Polaj unuiĝoj: naciistaj unuiĝoj ne rekonantaj la programon de klasbatalo (analogiaj al la Hirsch-Dunker'aj unuiĝoj en Germanio aŭ al Amerika Federacio de l'laboro). Ili plej parte ekzistas en la antaŭa prusa Polio, kie ili kalkulas 240 516 membrojn.

(2) Kristanaj unuiĝoj: estantaj sub influo de pastraro kaj gvidantaj batalon kontraŭ socialismo.

(3) Diversaj unuiĝoj: unuiĝoj kies programo kaj ideologio ne estas precize difinitaj.

don. Kvardek profesioj posedis organizaĵojn dissemitajn sur tuta teritorio, en ĝiaj diversaj lokoj aŭ regionoj.

Tia estis la situacio en majo 1920, kiam en Varŝavo okazis la unua kongreso de profesiaj unuiĝoj el la tuta lando. koncerne la profesian movadon, ĉi tiu kongreso fiksas sekvantajn principojn:

1) La organizo de ĉiu profesio devas respondi al la speco de produktado kaj ne al la profesia kvalito de membroj.

Tiumaniere, ĉiu unuiĝo povis tute ampleksi unu el la branĉoj de industrio. Ekzemple, la unuiĝo de metallaboristoj grupigas ĉiujn laboristojn okupatajn en la metalurgia industrio, ankaŭ tiujn, kies persona laboro havas neniun rilaton kun la prilaborado mem de la metaloj.

2) Ĉiu el la branĉoj de la produktado devas posedi nur unu solan profesian organizaĵon.

Sur la bazo de tiuj ĉi du principoj organiziĝis de nun la pola profesia movado. Depost la monato majo 1920, t. e. depost la dato de l'kongreso, oni komencis centralizi la unuiĝojn de metallaboristoj, de laboristoj de ĥemia industrio, de la municipalaj⁽¹⁾ laboristoj kaj de la laboristoj de la nutraĵa industrio. Aliparte, la klasaj unuiĝoj el la antaŭa prusa Polio, la fervojista unuiĝo kaj la profesia Asocio de la laborantoj en la industrio kaj komerco aliĝis al la Centra Komisiono de klasaj unuiĝoj.

La disvolviĝon de la Centra Komisiono karakterizas sekvantaj ciferoj:

decembro 1919	333 735	membroj
julio 1920	506 000	»
majo 1921	650 000	»

Ni aldonos ankoraŭ kelkajn ciferojn kiuj montros la gravecon de unuopaj unuiĝoj. Ni vidos el ili, ke nur 8 unuiĝoj kalkulas pli ol dekmilon da membroj. Interese estas ankaŭ, ke ne ĉiuj klasaj unuiĝoj en sama grado disvastigis sian influon sur la tuton de la laboristaro. Ĉi tiu fakto klariĝas per tio, kion ni supre diris, ke multaj unuiĝoj staras ekster la Centra Komisiono. Krom tio ĝis nun ekzistas multaj tute ne organizitaj laboristoj.

La tabelo estas sekvanta:

	Nomo de unuiĝo	Nombro de organizitaj laboristoj	Procento kompare kun tuta nombro
1	Terkulturaj laboristoj	120 000	50 % ⁽¹⁾
2	Fervojistoj	95 000	45 %
3	Teksistoj	45 000	20 %
4	Metallaboristoj	35 000	
5	Ministoj	35 000	50-60 %
6	Lignaj laboristoj	12 000	
7	Konstruaj laboristoj	14 000	
8	Municipalaj laboristoj	10 000	
9	Gastronomiaj laboristoj	6 000	
10	Laboristoj en ĥemia industrio	7 000	
11	Sukerfabriko-laboristoj	3 500	60 %

(1) Nur en antaŭa rusa Polio.

La disvastigon de la profesia gazetaro montras sekvanta tabelo (enhavas nur klasajn organojn):

	Nomo de la gazeto	Kies organo estas	Kiel ofte aperas	En kiu loko aperas
A. Organoj de centralizitaj unuiĝoj				
1	Zwiaskowiec	Centra Komisiono de Klasaj Unuiĝoj	2-foje monate	Warszawa
2	Metallowiec	Metallaboristoj	«	»
3	Kolejarz-Zwiaskowiec	Fervojistoj	«	«
4	Wiokniarz	Teksistoj	«	Lodz
5	Gornik	Ministoj	Semajne	Sosnowiec
6	Szklarz	Vitro-laboristoj	2-foje monate	Piotrkow
7	Cukrownik	Sukerfabriko-laboristoj	«	Warszawa
8	Wiadomosci graficzne	Grafikaj laboristoj	Monate	«
9	Niedola chlopska	Terkulturaj laboristoj	2-foje monate	«
B. Organoj de necentralizitaj unuiĝoj				
10	Zwiaskowiec	Unuiĝitaj liberaj profesiaj unuiĝoj de antaŭa prusa Polio	Monate	Bydgoszcz (Bromberg)
11	Robotnik Budowlany	Laboristoj de konstrua industrio	2-foje monate	Warszawa
12	Wolny Zwiaskowiec	Centra Pola Profesia Unuiĝo (klasa) en Supera Silezio	«	Katowice (Kattowitz)
C. Ekster la limoj de Pola Respubliko				
13	Gazeta Gornicza	Ministoj	—	Morawska Ostrawa (Ĉeĥoslovakio)

La profesia movado en Polio estas kompreneble kampo de batalo inter la socialistoj kaj komunistoj. En la kongreso de majo 1920 supercon akiris la socialista partio, kiu ĝis nun gvidas la movadon. Ĝia agado estas konforma al la rezolucioj de la Amsterdama Internacio, al kiu apartenas polaj profesiaj unuiĝoj.

PRILABORITA de K. D. (VARSOVIO)

Francio konstituigis, kiam mortis la provincoj, kaj la humana sento eknaskigis sur la kadukiĝantaj patrioj.

GUSTAVE FLAUBERT.



Pri organizaj demandoj

La statuto en la manoj de la kamaradoj, atente tra-legita kaj studita de ili, ĉiu sentas la grandan spiriton, la profundan korbato en la interno de nia movado kaj jam li vidas la grandecon, fruktodonecon de l' Asocio nia.

En Praha la delegitoj kunalportis la erojn, la ŝtonojn kolektitajn de la tutmonda samideanaro por nia komuna domo kaj konstruis la fundon de nia Asocio. Sekve ĝi ne estas produktaĵo de unuopa persono aŭ grupo, sed de komuna pritraktado. Bone ni konstatis en Praha, ke ĝenerala, funda diskutado vidigas vidpunktojn, kiuj ne povas esti rimarkataj nur de unu sola persono aŭ grupo. Certe oni ankaŭ ne asertas, ke la statuto jam atingis sian perfektecon aŭ plenecon. Al la praktikaj spertoj el la laborado por la movado estas rezervataj ĉiam aldonoj aŭ ŝanĝoj. Ni ja volas vivantan organizaĵon kaj ne rigidiĝantan!

Ni nun havas la tutmondan organizaĵon kun ĝia ĉefa celo „praktike uzadi Esp.on por la liberiga movado de la proletario“. Sed apud S.A.T. ankaŭ ekzistas laŭlande organizitaj asocioj kiel ekzemple la *Germana Lab. Esp. Asocio*, kiu celas la disvastigadon kaj instruadon de Esp.o inter la Germanparolanta laboristaro kaj la praktikan uzadon de Esp.o por la laboristaro. Konsiderante, ke la dua celo de la landaj L. E. A. estas nia ĉefa celo kaj ke la unua celo estas ankaŭ nepre necesa, mi petas la kamaradon, ke ĉiu pristudu kaj pripensu la fakton de la ekzisto de du samcelaj Esp. organizaĵoj en unu lando. Ĉu tiu ĉi ekzisto ne senkreditigas nin, ĉe ĉiuj prudente pensantaj homoj? Ĉu ne estas tio malŝparemo de la fortoj? Ĉu ni estas tiom riĉaj por posedi tian lukson? Miaj samgrupanoj kaj mi opinias, ke ne!

Nun estas fakto, ke ni tuj je la komenco de la enpenetriĝo de Esp.o inter la laboristaro ne povis fondi tutmondan organizaĵon. Unue kolektiĝis la samideanoj loĝantaj en sama urbo por fondi grupon, poste ili serĉis kontakton en la plej proksimaj urboj, precipe en la samlingvujo por preparoli propagandajn kaj porinstruajn aferojn, ĉar nur tre malmultaj lerte estris la lingvon. Tiaj interrilatoj kondukis al la fondo de la landaj L. E. Asocioj. Sekve mi konstatas, ke nenia naciisma aŭ simila ideo estis la instiganta aŭ partoprenanta forto ĉe la fondo de la landaj L. E. Asocioj!

De jaro al jaro nia movado, dank' al la fervora laborado de niaj pioniroj, kreskis kaj la internaciaj rilatoj multe pli grandigis kaj firmigis en ni la konvinkon, ke nur tutmonda asocio povas esti plej fruktodona. Ĉiu longjara kunbatalanto memoras pri la bone redaktita „Internacia Socia Revuo“ de K.^{do} Nutter kaj pri ĝia valoro por nia movado.

Bedaŭrinde la financaj cirkonstancoj kaj ankaŭ kelkaj malpli gravaj kaŭzoj malpermesis, malebligis renkontiĝon

de diverslandaj kamaradoj dum universala E.kongreso. La granda mondkrimo pereigis preskaŭ ĉiujn semojn, sed ĝi ankaŭ pretigis la teron por ke la restintaj semoj de ni plantitaj fariĝu pli fruktodonaj kaj hodiaŭ mi ĝoje konstatas, ke kreskis nova, plie verda kaj freŝa herbo el la polvo kaj cindro. Konsciiĝis granda parto de la homaro, ke devas esti ŝanĝataj la nunaj ekonomiaj kaj politikaj sistemoj, se interfratiĝo de la popoloj estus ebligata. Tiu parto favoras nian ideon pri la neceso de interkomprenigilo kaj ni registras regule pli grandajn sukcesojn.

Nia historia tasko estas kunigi ĉiujn Esperantistojn, kiuj estas samcelaj en la uzado de nia lingvo por la mondriĝo de la socialismo, komunismo. La landaj L. E. Asocioj kaj S. A. T. parte atingis la kunigon, sed mem ili ankoraŭ ne estas unuigintaj aŭ pli bone ankoraŭ ni ne havas la unuigon, kiu plej bone povas plenumi niajn du celojn plej ĉefajn.

Por ke ni havu nur unu grandan asocion mi proponas al la kamaradoj, ke ili akceptu en la statuto sub celo ankaŭ jenan frazon: „Propagandadi, instruadi la lingvon Esp.o inter la gelaboristaro“; sub organizo: «Starigo de propagandaj komisionoj en la samlingvujoj.» Per ĉi tiuj du frazoj ni rajtigas kaj ebligas la enkadriĝon de la landaj Lab. Esp. organizaĵoj, ja eĉ ni postulas la enkadriĝon en S.A.T., ĉar tio nur povas esti plej efika por nia tuta movado. Ĉi tiun proponon mi ankaŭ faris dum la kongreso en la nomo de la grupoj el Munĥeno, Augsburg, Traŭnstein, sed pro kaŭzoj diversaj, kiuj ĉiam estiĝas dum unuaj kongresoj kaj kunvenoj, la propono laŭ mia opinio estis ne sufiĉe pripensita kaj tial malakceptita.

Sed nun en la praktiko ni vidas, ke venontjare okazos la ligoĝo de la Germ. Lab. Esp. Asocio kaj jam aŭdiĝas la voĉoj, ke estas sensecaĵo esti organizata en du asocioj, kiuj plej bone povas labori en unu kadro. Ni, kiuj ja ankaŭ estas anoj de la G. L. E. A. jam proponis por la ligoĝo, ke ni aliorganizu la G. L. E. A. en propaganda komisiono por la germanlingvujo, ke ni kreu propagandajn distriktojn kaj, kio estas la plej ĉefa, enkadriĝu en S. A. T., ke ĉiu ano fariĝu ano de S. A. T. kaj la G. L. E. A. ne plu ekzistu kiel organizaĵo.

Pri la teknika solvo mi ne bezonas paroli ĉi tie. Tio estos la tasko de la ligoĝo. Sed, ke estas necese la enkadriĝo aŭ pli bone la eniĝo en S. A. T. de la landaj Asocioj la samgrupanoj kaj mi estas konvinkitaj. Sed ankaŭ pri tio ni estas unuopiniaj, ke ni ne akcelas la movadon detruante la landajn Asociojn aŭ lasante kuŝi flanke la propagandan movadon. Mi ne plu volas okupi spacon en la gazeto per tro longaj argumentoj favoraj al la propono farita, ĉar mi pensas ke la kamaradoj jam mem pli bone ekkonis la necescon de unu sola „Asocio“ por la „Ruĝverduloj“!

Vi kamaradoj en ĉiuj landoj proksimaj kaj malproksimaj alportu brikojn kaj erojn por nia komuna domo!

K. D. (Munĥen).

“LA KAVERNO DE ZARATHUSTRĀ”

Eksperimento

La unua socia sistemo estas ĉiufanke atakata. Sed, dum la plimulto celas unue forrenversi perforte la Kapitalismon, kelkaj personoj opinias, ke oni ne devas atendi ĝis la Revolucio estos sukcesinta por vivi komuniste kaj liberece.

En Rusio la sperto ŝajnas montri, ke ne estas eble per dekretoj kaj leĝoj tuj trudi al ne edukita amaso novan vivkondiĉaron. Tial la eksperimentoj faritaj en «kolonioj», kie oni celas vivi laŭ «natura» kaj «libereca» maniero, estas ĉiam interesaj kaj konigindaj. Tiucele ni enmetas la raporteton de Berlina K.^{do}, kiu kelkfoje vizitis la «Kavernon de Zarathustra» — Red.

Antaŭ 2^{1/2} jaroj, kelkaj personoj, volontaj sin liberigi de la nuntempa, hipokrita vivmaniero decidis fondi «Kolonion» sur la kamparo. Ne malproksime de Berlin en «Rotes Luch» (Ruĝa Marĉo) ili sukcesis lue ricevi de iu grafo sufiĉe grandan kampon (10 hektaroj), kie ili vivas laŭnature. El proksimume 30 personoj konsistas la kolonio. Krom tiuj, subtenantoj kaj aprobantoj laboras en Berlin por monhelpi la entreprenon ĝis la situacio estos pli favora. Aliparte, notinde estas, ke krom kelkaj fervoruloj, kiuj estas tie de la komenco, la plimulto de la kolonianoj konsistis ĝis nun preskaŭ nur el «trapasantoj». Proksimume 300 personoj jam vivis kelka tempo ĉe la kaverno.

La iniciinto, instiganto kaj animo de tiu asocio estas Doktoro Med. Heinrich Goldberg. Ofte li venas Berlinon por paroladi pri sia entrepreno kaj varbi anojn kaj subtenantojn. Nun li ne estas ĉe la Kolonio, sed en malliberejo. Liaj malamikoj tiris el la forgeso aferon el la jaro 1911, kiam D.^{ro} Goldberg tenis privatan klinikon, kie mortis du virinoj. Pro tio li estis lastatempe kondamnita al kvarjara malliberigo.

*

La kolonianoj estas gastemaj. La vizitantojn ili akceptas bonkore kaj invitas al partoprenado en la vivon de la Kolonio. Ĉe unu el miaj vizitoj, matene ni ĉiuj duon-aŭ tutnude nin banis en la rivereto; post tiam ni kune manĝis la ĵus kuiritan pirsupon. Poste mi rigardis la domegojn komencitajn kaj finkonstruitajn, ankaŭ la tendojn. Ĉie estas fositaĵoj por forluigi la akvon, ĉar tie estas malseka herbejo. Apude estas kampo, kie jam vige kreskas legomoj. En la stalo kelkaj bestoj: kaproj, kokoj kaj kunikloj. Alia konstruaĵo entenas la ilaron. Alia estas konstruita laŭ la maniero de la negroj; ĝi estas nomata «kralo» kaj konsistas el ronda trabaĵo, kovrita per kanoj.

Laŭplaĉe ĉiu okupas sin per ia laboro: kelkaj fosas; aliaj faligas arbojn aŭ elradikigas ilin. Temas konstrui domon por la vintra sezono.

Je la tempo de mia vizito, virino jam estis naskinta,

alia naskonta. Oni ne demandas, kiu estas la patro. La infanoj apartenas al ĉiuj. Aliaj infanetoj, kiuj ne naskiĝis en la komunumo estas tamen konsiderataj kiel anoj de la familio. Al la komunumo povas aniĝi ĉiu, kiu konsentas kun la celo de la entrepreno, kaj ĉiu povas foriri se ne plu plaĉas al li.

*

Antaŭ kelka tempo la landkonsilisto vizitis la kolonion kaj ordonis, ke devas ekzisti almenaŭ du dormejoj, por ke la viroj kaj la virinoj dormu aparte.

— Tio ne estas necesa, estis responde al li. Ni amas libere. Ĉu vi scias kio estas libera amo?

— Um! ... Jes, mi scias! ... sed ĝi estas malpermesata de la leĝo.

— Leĝojn ni ne havas. Ni estas liberaj homoj.

— Tamen, ĉar vi estas en Germanlando, vi devas havi du konstruaĵojn.

— Nu, tiuj ja estas.

La landkonsilisto foriris.

En la proksimo staras nove konstruita edukejo, kies Direktoro malamas la kolonianojn, precipe tial ke ili sin banas nude. Interparolante, iun tagon, tiu sinjoro diris:

— Mi celas fari bonajn Prusojn.

— Mi volas fari bonajn Homojn, respondis Goldberg.

Estas kelkaj idistoj en la Kolonio kaj unu esp.isto. Mi parolis kun tiu ĉi lasta. Lu vizitanto konstatinte, ke la esp.istoj parolas flue sian lingvon, dum la idistoj ne scias tiel flue paroli ŝanĝis sian opinion pri ido kaj decidis lerni esp.on. D.^{ro} Goldberg estas fervora idisto, cetere li estas poligloto.

*

La bienposedanta grafo estas iom favora al la entrepreno. Li konsentis fari lukontrakton kun promeso, ke post dek jaroj la Kolonio havos la rajton esti la unua aĉetanto de la bieno.

Kio okazos ĝis tiu tempo? Neniu povas antaŭscii. Certa estas nur, ke multaj personoj deziras tuj praktiki novan vivmanieron. Lastatempe sin anoncis kelkaj junuloj el la ŝtato Thüringen (parto de Germ.). Seniluziiginte pri la doktrino de Karl Marx ili volas tuj vivi laŭpove la komunismon. Ili intencas fondi filion de la Komunumo en Turingio, kiel tiu jam ekzistanta en Uerdingen apud Rejno. Ili konsideras nepre necese, ke ekzistu pluraj similaj entreprenoj por ke oni povu interŝangi la gemembrojn. Tio estas nepre bezona kondiĉo de sukceso.

HOMO.

(1) Nun ĝi aspektas iom alie.



Vidaĵo el la Kolonio (1)

AŬTUNA KANTO

Novelo, originale verkita de Aladar Bán

Dediĉite al unu antaŭa kanto.

Ŝi ne rimarkis, kiam li eniris la ĉambron, eĉ ne tiam, kiam li alproksimiĝis al ŝi mallaŭte salutante. Estas vere, ke liaj piedoj enprofundiĝis en silkan tapiŝon, kiu kiel fidela kaj delikatesenta servisto ensorbis la bruon de liaj paŝoj por ke ĝian sinjorinon, kiu sidis kun libro defalinta en la mano apud kameno rokokostila, nenio povu embarasi en sia songado. Tamen la junulino ne songadis, nur ŝia sintenado similis al ĝi. La libro lacigis ŝin, ĉar manke de alligiĝo subjektiva la literoj, la vortoj, la frazoj pezis sur ŝiajn nervojn kvazaŭ per siaj fizikaj pezaj, kaj la legado signifis por ŝi nenian freŝecon, animtuŝon, eksupreniĝon aŭ sentaĵojn diferencajn de la ĉiutagaj, sed nur tempoflikadon meĥanikan. Tamen oni ne pensu, ke ŝi estis malsensibla aŭ manke de imagpovo, la estaĵoj elvivis en ŝia animo sian plej intensan vivon, kaj kiel estis amuzado por ŝi rigardadi la lumon ŝanceliĝantan kaj alterne intensan de la kameno desegnadi figurojn strangajn, kriplajn kaj kelkafoje groteskajn sur la objekto lumigata, same, se ekstere ekĉesis la vento kaj la tremado de la fenestrovitroj aŭ la brulbrueto de malseka ligno kaj ŝian animon ekkaptis la mistera silento — ŝi estus povinta eĉ plori pro timo.

— Bonan vesperon! — alparolis ŝin la junulo per tono, pri kiu estus malfacile scii ĉu ĝi enhavis pli da amemeco aŭ da timo. Ŝi eklevis la kapon kaj alrigardis lin, sed tiom fremde kvazaŭ ŝi ne estas lin reekkoninta (kaj estas eble ke por momento ŝi vere ne volis lin rememori).

Vi, nun, ĉi tie? . . . ĉu vi ne timas min trovi sola? — kaj en la sekvanta momento ŝi jam ekridetis.

Kiam nokte ĉe kurbigo de ŝoseo subite ekbrilas du majestaj kaj malvarmaj reflektilkoluloj de aŭtomobilo — same impresis la animon de la junulo ĉi tiu akcepto kaj la supereco kaj aminda humoro de la junulino lin eĉ pli multe senkuraĝigis. Preskaŭ li estis inklina „refari“ ĉion, sin turni kaj elkuri, kvankam li atendis tiom de tiu ĉi renkonto! Inter kvar okuloj kun ŝi! Ĝis nun ankoraŭ neniam estis okazo por tio, ĉar ĉiam ĉeestis invititoj kaj de la knabino, kiu estis laŭtlegistino de la grafino, ne nur sian denaskiĝan libramon rabis la profesio, la eterna fizika kaj spirita robtrenaĵportado, sed ŝin senigis ankaŭ de la plejmulto, kion la vivo povas doni al animo delikata — ĉar ŝi ne povis resti sola laŭ sia plaĉo.

Solesto! Fokuso de ĉiuj ekstremaj valoroj de la homo, tiu de l' estimado entuziasma aŭ timema de la distanco, de la neatingebleco kaj de la senfinaj dimenzioj, ĉi tiu fundamento de la vera religia sentado kaj tiu de la proksimeco, la senpereco, la mistero de la intimeco, tiu de la sentado de la Mio. La animo, ja animo de l' individuo estas ja tia, kvazaŭ oni vidus la saman objekton tra la du finiĝoj de la sama teleskopo: je senfina distanco ĝi malgrandegiĝas kaj je senpera proksimeco ĝi trograndiĝas. Kaj kiajn sekretojn havas la soleca animo! Kiam ni ekrigardas en nin mem, kvazaŭ la tero fendigis ankaŭ ni kaj ni malsupren vidas ĝis profundoj, puraj kaj misteraj fajroj kiuj estas gardataj eĉ hodiaŭ de Vesta-virgulinaj kaj ni ekiras trenataj de fortoj nevideblaj, ni atingas profundojn iom post iom pli grandigantaj kaj la mistera fajro ĉiam kreskas antaŭ ni; ju pli ni malsupreniĝas des pli la fajro varmegiĝas, ju pli ni alproksimiĝas al ni mem des pli ĝi fariĝas brulante kaj fine ne plu! Ŝanceliĝas nia vido en la lumo blindiganta kaj la fajro nin bruligas kaj brulegiĝas, dume super nia animo disiĝinta, nian tutan animon plenigas anĝelaj harmonioj. „Ekkonu cin mem!“ sonoras milionoj da horoj, sed ĉi tion atingas nur nia sentado, ne niaj pensaĵoj kaj vortoj maldelikataj, kaj kiam vi revekiĝas, kiam ni estas ekembarasitaj, la animo kiel limako je la unua tuŝo reendomiĝas — kaj ni forgesas por eterne niajn plej belajn songojn. Kion do povis scii pri ĉi tio tiu pala malriculo, kiu staris antaŭ la junulino senkuraĝe kun sia humiligiĝinta amo, ŝanceliĝante kiel ŝipo ne povanta enteriĝi sian ankron. Eĉ la plej delikataj, la plej indulgema animoj fariĝas kruelaj, repuŝemaj en momentoj tiaj kaj ve al la viktimoj! Ĉar ili ambaŭ estas viktimoj, unu el ili estas la mondo, la alia estas la Mio kaj ĝis

kiam ĉi tiuj du ne estas unu, ĝis tiam la Mio devas ĉiam forte puniĝi pri sia deziro al superaĵoj.

La junulino ektemis kaj refariĝis kia ŝi estis antaŭe.

Nu sidiĝu ĉi tien apud mi, vi malsaĝuleto — ŝi alparolis lin kun patrina voĉo kaj altiris seĝon pli proksimen al si; ĉi tiu gesto, kiu estis eble tute sensignifa, tuŝis la koron de la junulo kiel sunradio varma kaj li sidiĝis kun sento kvazaŭ li surirus tronon.

— De kie vi sciis, ke mi estas sola?

— Mi tion sentis.

— Ne estu tiom romantika, ĉi tio jam ne decas en via aĝo.

La junulo eksilentis.

Ĉu vi koleras?

— Ne, ne — diris la junulo iom pasie — vi estas tia, kia vi estas. Min doloras nur, kiam vi disiras de mi.

— Vi volas eliri, kiam mi disiras viajn revojn?

— Henjo, Henjo, estu jam fojon vere sincera kaj ne suferu min plu. Mi detruigiĝas pro la malsenteco.

— Pro kia malsenteco?

— Mortigantino, vi postulas vortojn de mi, vi volas, ke mi min mem mortigu per miaj propraj ponardoj?

La knabino mallevis la kapon kaj pensigiĝis.

— Strange, ke ni konas unu la alian nur de post du semajnoj.

— Kial tio estas stranga?

— Ĉu vi ne sentas tion?

— Ne.

— Mi certe.

— Mi ne sentas tion strange, ĉar miaj sentoj ne konas la tempon.

Ĉu du semajnoj? ĉu du jaroj? — egale. Vi regas mian vivon. Se vi estas bone al mi, se vi min amas. . . .

— Se vi min amas?

— Jes. . . .

— Nu, mi vin amas. . . .

— Do kial vi ne amas min?

La junulino nevole ekridetis.

— Tion povas klarigi grava pasintaĵo. Eble ĝi ne estas vere granda, nur kompare al mia malgrandeco. Se vi havos paciencon, mi ĝin prirakontos.

— Mia patro estis provinca bienposedanto, nobelo koncerne devenon kaj sentadon, tamen li ne estis detalema naturo, li ŝatis nur la gestojn ampleksajn kaj profundsencajn. Li estis puritano, fidelo al la tradicioj de siaj prapatroj kaj se en sento aŭ penso li estis devigata de la vivo iomete deturniĝi de ili, oni vidis, ke li interne batalas. Li instruis al mi religion kaj historion, ĉion alian li lasis al mia patrino. Ŝi estis ĉiurilate lia kontraŭulino kaj miajn nunajn okulojn, ĉi tiujn sendankajn okulojn dolorigas vidi ilin kune en la estinteco.

— suferadi kaj doloradi: por mi.

Mi estis la sola infano kaj miaj infanjaraj estis la plej feliĉaj. La trotemperita, eksalta amo de mia patrino, kiu banis min konstante kiel akvoŝalo varmega, ĉiam konsolis min, kiam mia patro estis iom pli severa al mi ol li estus volinta, ĉar ĝin reguligi estas ja tre malfacile kaj li ĉiam bedaŭris tion — sed tamen li estis ĉiam severa.

Mia patro estis kiel bonega fakulo fama en sia metio, li kulturis sian teron per maŝinoj senditaj el Ameriko, li havis imponan faklibraron kaj pli ol unu fojon okazis ke el bienoj proksimaj kaj iom malproksimaj oni venis por peti liajn konsilojn. Li ŝatis sian teron per ia pia sankta entuziasmo, kaj li estis gvidata per tiu ĉi sento kiam post la rikolto li disdonadis al ĉiuj oficistoj kaj dungitoj la ricevotaĵon, li donis du aŭ trifoje pli multe ol ili rajtis postuli, ĉar li eksentis, kvankam eble ne konscie, ke la vero komenciĝas ĉe la tero, en la tero ĝermas kaj maturiĝas la vero, kaj kiam li donis, kiam li donis pli multe, li sentis kvazaŭ li senŝargiĝus de granda surpezo unu post alian pecetojn de sia animo. La najbaraj farmistoj malamamis lin pro tio, dirante ke li gatas iliajn dungitojn, ĉar estis afero de fiereco kaj de feliĉo, dungigi en la farmon de Sinjoro Baróthy. Ili lin evitis pro tio kaj li estis tio fiero por demandi la kialon de ilia sintenado.

Tiel do vivadis sian monotonan, ŝablonan vivon tra jarcentoj nia prapatra domo, kiu scias depost kiom de jarcentoj? Kaj kiu scias ĉu ne ĉi tiu severe ĉirkaŭbarita, senelbalanca vivo, ĉi tiu je plej ĉefa vivprincipo levita ŝablono estis la fundamento de l'

evolucio kaj envivrestado de tiu tradicio, kies sekvo estis, ke la okuloj de la homoj estis fiksataj preskaŭ ĉiam posten, kvazaŭ ili havus siajn okulojn ne en la vizaĝo sed malantaŭe en la kranio. Ĉiuj iliaj pensoj kaj sentoj sin direktis al la estinteco kaj pro ĝi ili timegadis ĉion novan, kio eĉ je nuancoj estas ofendinte tiun animan unuecon de la raso. Tamen la revolucio estas pli antikva ol la vivo mem. Ĉu ne la tero estis la unua revoluciulo, kiam ĝi elŝiris sin el la suno kaj akceptis la riskon de milionoj de danĝeroj de la vivo libera, sola kaj forlasita en la glacia spaco? Kaj revoluciulo estis la homo, kiam li elperfortis sin el la tradicioj miliardjaraj de la besta vivado por komenci sian fatalan luktadon por fariĝi homo. Kaj ĉiu, kiu revas estas revoluciulo.

Tia revoluciulo estis ankaŭ mia patrino. Koncerne eksterajojn ŝi estis tute burĝino. Nur kiam en printempo ŝi travagadis kun mi la kampojn de tagiĝo ĝis vesperiĝo kaj el ŝia animo elŝiriĝis tiuj harmonioj tiuj rapsodaj improvizaĵoj kiel floro metita sur fenestron kadritan ŝutante siajn kalikerojn sur la trotuaron, kaj kiam sentante nek malsaton nek soifon ni flugetadis tien kaj reen apenaŭ tuŝante la teron, kaj kiam poste vespere falinte liten ŝi altiris min al si kaj ĉirkaŭprenis kun tia forto, ke mi ekkriis tiam ŝi edukis min, tiam ŝi edukis mian revoluciulo. Ĉu ne, vi ridetas pri tio? Mi, la grafa servisto kiel revoluciulo! Sed tamen, kreu al mi pulvo restas pulvo eĉ mil jarojn se ĝin ne tuŝas fajro! Mi scias vian kontraŭdiron: ĉu la ĉielo ne havas sufiĉe da fulmoj por ĝin bruligi? Se, jes, ĝi havas kaj kelkafoje ĝi ekbatatas min, se mia cerbo, ĉi tiu fulmforigilo ne gardas atente, vi al mi! Kaj efektive ĝi ektruas nur mian internon, kaj pri la eksterajo oni povas diri suprece: memesteno. Sed mi rakontos plue pri mia patrino. Nur la printempo estis tiom krizplena por ŝi, la somero ŝin malfreŝigis, la aŭtuno ŝin enfermis en sin mem kaj la vintro revelis en ŝi serenajn kaj saĝajn filozofon. Reganto estis tamen ĉiam la printempo en ŝia animo, nur ĝi maskis sin. Oni ĝin nomis foje somero, foje aŭtuno kaj foje vintro. Mi neniam forgesos tion: foje ni havis gastojn, parencojn, kiuj ĉiun dekan jaron vizitis nin kaj ili invitis ŝin post vespermanĝo ludi ion fortepiane. Ho kiom plastike mi vidas tiun feliĉan geston, kun kiu ŝi eliris sin de la societo kaj sin savis de ili je distanco neatingebla. Ŝi ludis la simfonion „Pastorale”, tio estis en vintro, sed kun tiom da entuziasmo printempa, ke mi resentis min sur la kampoj kun haroj kaj sentoj displektitaj en la suno. Ŝi ne atentis sian aŭskultantaron, ĝisfinludis la tuton kaj fininte ŝi eklevis sin kaj kiel somnambulino trairis en la apudan ĉambron, kaj ni povis aŭdi nur ŝian dolorplenan ploradon.

La okazaĵo mem komenciĝas, kiam mi fariĝinte pligrandulino, kiu havis tamen nenan respekton por virinoj, mia patro alvenigis por mi edukiston el la urbo. Li estis alta, bruna junulo kun dikaj lipoj kaj io ekstrema malalloga estis en lia eksterajo. Kaj lia sintenado kontraŭ mi ankaŭ ne estis pli konsoliga. Li volis plenumi sian profesion laŭ la plej oportuna maniero kaj li volis lernigi ĉion parkere. Per tio li min faris sia plej akra malamiko kaj ne havante kuraĝon plendi pri tio al la patro, mi priploris ĉion al la patrino. „Ĉu tio ĉi estas la lernado, la sciado, pri kiu ci rakontis al mi tiom bele? Ĉu ĉi tio min faros pli saĝa kiam post la lecionoj mi estas tiom konfuzita, ke eĉ kapdoloroj min kaptas kaj mi dormemiĝas? Mia patrino ekridetis kaj provis silentigi min“. Vidu, etulino mia, ankaŭ la metiistoj devas unue ekkoni sian ilaron, lernadi siajn manipulojn kaj bonajn aĵojn. Kaj nur poste ili povas produkti tiom da belaj kaj bonaj aĵoj. Kaj ĉu la plej bela domo ne konsistas el brikoj, malbelaj, ruĝaj, kaj tamen se oni ne konas ilin, oni ne povas konstrui domon, ĉu ne? — „Sed tamen oni povus senti plezuron pri ili“ — mi respondis, post kio mia patrino fermis mian buŝon per longa kiso. Al ĉi tiu homo, la edukisto, mi neniam povis alkitimiĝi. Li estis por mi kvazaŭ enkorpiĝinta la „Trudon“ la „Devon“ kaj pro tio mi lin ekmalamegis.

Sed la sintenado de mia patrino al mi iom post iom ŝanĝiĝis. Ŝi okupis sin malpli pri mi, ŝi kisis min pli malofte kaj eĉ mi sentis kvazaŭ ŝi serĉadus siajn karesvortojn. Kaj poste ŝi ekbatis foje mian manon en maljusta ardo — kaj depost tiu momento staras antaŭ mi tiom monstra, tiom neperceptebla, tiom senindulga, tiom en sia esenco la Vivo. Mi tiam estis

jam ĉirkaŭ depost dek jaroj naskita al la vivo, sed ĝi naskiĝis por mi en tiu momento. Tiam naskiĝis en mi la „Kialo“, talizmano de ĉiuj doloroj kaj de ĉiuj feliĉoj. Kaj depost tiu tago la vivo fariĝis mia edukisto. De nun mi komencis vidi ĉion de l'aliflanke. Baldaŭ mi komprenis, ke mi naskiĝis blinde, kaj ke la okuloj malfermiĝas nur tiom, kiom oni travivas konscia kaj pensanta. Mi komencis observi mian patrinon. Kaj baldaŭ mi konstatis strangajn faktojn. Mi rimarkis ke dum la tagmanĝo mia patrino rigardas pli ofte la edukiston ol sian teleron. Kaj ke ŝi rigardas lin kun tiaj okuloj, kun kiuj ŝi rigardadis nur min ĝis tiam. Ĉi tio jaluziĝis kaj koleregigis min, ĉar mi malamegis tiun homon. Vekiĝis mia infaneco kaj ekestis en mi nova plezuro: sentado de la venĝo venonta. Mi tremis pensante ke mi venĝos je li, kiu volas aŭ eble jam vere rabis de mi la patrinon. kaj la tago alvenis. La dormĉambro de mia patro estis teretaĝe, tiu de la patrino estis sur la unua etaĝo kaj mia ĉambreto estis apud la tiu. La edukisto loĝis en la subtegmentaĵo. Tiun vesperon mi estis eksterordinare ekscitita. Posttagmezon mi ĵetis la vortojn en la vizaĝon de l' edukisto: „estus bone, se vi ne rigardadus tiom la okulojn de mia patrino“. Kion li respondis per „impertinentulino“. Mi suprenkuris en mian ĉambron kaj pro la kolerego ŝiradis la harojn. Tiel paroli al mi! kaj kiu parolis tiel? Mi nur bedaŭris, ke mi ne saltis sur lin kaj ne elungumis liajn okulojn. Kunvestaje mi ĵetis min sur la liton kaj pro la interna elĉerpitico endomiĝis.

Nigra kiel fulgo estis ĉio ĉirkaŭ mi kiam mi revekiĝis. Dum sono mi aŭdis, ke oni serĉis min, eĉ kvazaŭ mi estus aŭdinte la voĉon de mia patrino, oni frapadis ankaŭ sur mia pordo, sed ĉar ĝi estis fermita kaj mi ne faris vivosignon, oni kredis, ke mi ne estas tie. Mi estis ekstrema senfortiĝinta, kiam mi vekigis. Kaj tra tiu ĉi anima kaj korpa duonveno balanciĝadis antaŭ mi la antaŭento de iu granda neatendita okazantaĵo. Min ekkaptis kapdoloro. Mi eliris en la koridoron por malsupreniri en la ĝardenon. Apenaŭ malferminte la pordon mi vidis ke iu enŝteliĝas en la ĉambron de mia patrino. Estis malhele sed tamen mi rekonis la edukiston. „Ho fripono, eble li volas ŝteli la juvelojn de mia patrino!“ — ĉi tio estis la unua penso, kiu kun mistera simboleco sub influo de timego, abomeno kaj venĝo trafulis min. Kaj mi komencis ploradi, veadi kaj kriadi: ŝtelisto! rabisto! helpon!“ Mi bruvigligis la domon. Servistoj venis kun batiloj ĉiuspecaj en la mano, ĉiu kun io, kion li povis rapide preni. Baldaŭ aperis ankaŭ mia patro, kun ĉaspaŝilo en la mano. Estis teruraj momentoj. Li volis eniri en la ĉambron de la patrino, sed ĝi estis fermita. La patro frapadis, poste frapegadis la pordon. Nenia respondo. Mia patro estis fortega homo, kaj la eksciteco duobligis lian forton. Li ekperfortis la pordon, ĝi krakis kaj allasis. Ni eniris. En la dormĉambro estis neniu kaj regis plena ordo. La lito estis kovrita kaj nenia signo pri tio, ke oni ĝin volis malkovri. Ĉi tiu vidaĵo ŝajne trankviligis la patrinon, ĉar li elpelis la postvenintajn servistojn kaj fermis la pordon. El la dormĉambro estis eniroj en pli malgrandan ĉambron, kiu servis ankaŭ kiel buduaro. Ĉi tie ni trovis la patrinon kuŝantan sur kanapo en agonio. Ŝi estis vestita kiel dumtage kaj la boteleto de Veronalo jam elfalis el ŝia mano. La fenestro kiu kondukis al la ĝardeno estis malfermita. Cetere ĉi tie estis ankaŭ plena ordo, nur sur la pargeto, apud la kanapo kuŝis libro, kiel floro falinta. La patro en sia surprizego aŭdigis sonon bestan. Poste li malbutonumis la bluzon de la patrino kaj metis la kapon sur ŝian koron. (Dio scias, depost kiom de tempo denove.) Kaj li forkuregis. Li forrajdis al kuracisto: Mi nur rigardis, rigardadis la patrinon, kaj ĉar mi ankoraŭ neniame vidis mortinton, mi estis konvinkita ke ŝi dormas. Kaj tamen mi kliniĝis al ŝi kaj kisis la frunton.

La kuracisto alvenis malfrue.

La sekvantan tagon oni trovis la edukiston mortintan en la ĝardeno.

— Ĉi tiu estas la aŭtuna kanto de mia vivo, kiu enfermis sin en miajn orelojn kiel la mumurado de la maro en la konkon kaj kiu melebligas al mi aŭskulti la sonon de aliaj kantoj.

Nobla Sennaciulo

(15 Decembro 1855—14 Aprilo 1917)

Ĉiu esperantisto pli malpli scias pri la admirinda vivo de la aŭtoro de esperanto. Liaj sindonemo, modesteco, altanimeco fariĝis kvazaŭ proverbiaj ĉe esp. rondoj.

Sed oni ne metis sufiĉe en plenan lumon la ĉefajon el la spirito de Zamenhof: lian sennacieron. Tiu karakterizaĵo lia estis preskaŭ ĉiam vualita de ti-kiuj sin kredas la disĉiploj de la genia hebreo.



Hebreoj estas ja fakte sennaciuloj. Sed multaj ne estas tiaj spiritaj. Pliparto el ili revas pri restarigo de hebrea nacio en iu Palestino. Aliaj fariĝis ŝovinistoj el la nacio en kiu la hazardo naskiĝis ilin.

Zamenhof ĉiam superstaris tiujn aĉe etajn ideojn. Li volis esti nur homo, ne naciano. En sia ruslingva libro, kies titolo estas Hilelismo, laŭ la nomo de la profeto Hillel, li klarigis sian penson pri tio. Subsignante tiun verkon per la du latinaj vortoj Homo sum (mi estas homo) li sufiĉe precize montris la esencon de sia penso.

Mi estas homo, nur homo, ne iu ajn naciulo. Jen la bazo mem sur kiu ripozas la Zamenhofa etiko; jen la deira punkto de lia agado kaj vivcelo.

En 1914, petite partopreni kunvenon por fondo de Hebrea Ligo, li skribis al la organizantoj:

«Mi mem bedaŭrinde devas stari flanke de la afero ĉar laŭ miaj konvinkoj, mi estas «homarano», kaj mi ne povas ligi min kun celado kaj idealoj de speciala gento aŭ religio. Mi estas profunde konvinkita, ke ĉiu nacionalismo prezentas por la homaro nur plej grandan malfeliĉon, kaj ke la celado de ĉiuj homoj devas esti: krei harmonian homaron. Estas vero, ke la nacionalismo de gentoj premataj — kiel natura sindefenda reago — estas multe pli pardoninda, ol la nacionalismo de gentoj premantaj; sed, se la nacionalismo de fortuloj estas nenobla, la nacionalismo de malfortuloj estas neprudenta; ambaŭ naskas kaj subtenas unu la alian, kaj prezentas eraran rondon de malfeliĉoj, el kiuj la homaro

neniam eliros, se ĉiu el ni ne oferos sian grupan memaron kaj ne penos starigi sur grundo tute neŭtrala.

Tio estas la kaŭzo, pro kiu mi, malgraŭ la korŝirantaj suferoj de mia gento, ne volas labori nur por interhoma justeco absoluta. Mi estas profunde konvinkita, ke per tio mi alportos al mia malfeliĉa gento multe pli da bono, ol per celado nacionalisma.»

Tiuj noblaj vortoj lasas nenian dubon en nia spirito pri la sennaciemo de „Dro. Esperanto“. Cetere en 1905, ĉe la Kongreso de Boulogne-sur-Mer, li jam samsence parolis: «... Ni ĉiuj sentas nin kiel membroj de unu nacio, kiel membroj de unu familio... Ni konsciu bone la tutan gravecon de la hodiaŭa tago, ĉar hodiaŭ inter la gastamaj muroj de Bulonjo-sur-Mar, kunvenis ne Francoj kun Angloj, ne Rusoj kun Poloj, sed homoj kun homoj...»

Mi estas homarano. Ni estu ĉiuj nur homoj jen kvazaŭ la leitmotiv de la penso Zamenhofa.

Iu „eminentulo“, blufamanto kaj sciigisto de falsaj novaĵoj, povas maŝate paroli pri nove bakitaj esperantistoj. Lia elokventeco povas tondri. Li ne timigos nin kaj daŭre ne sukcesos monopoligi Zamenhof. La sennaciuloj tre konscias, ke ili sekvas la vojon montritan. Ili estas konvinkitaj, ke la „interna ideo“ estas io plena, se ĝi entenas nian sennacieron, kaj certe malplena se ĝi estas nur temo por paroladi antaŭ ministroj kaj reprezentantoj de kapitalistaj ŝtatoj, sed sufiĉe!...

La „nove bakitaj“ honoros la „Majstron“ ne per solenaĵoj, nek per preĝoj, nek per festoj, sed relegante kelkajn pecojn el lia verkaro. Li penos pli funde scipovi la sennacian lingvon; ili provos varbi al ĝi novajn anojn.

Zamenhof estis religio liberokreda. Konsekvence, ne per ritoj, nek per ceremonioj ĉispecaj oni pli bone povas honorii lian memoron. Nek per ŝtonaj aŭ bronzaĵaj monumentoj, sed per senlaca laborado por trudi al la homaro la de li kreitan universalan interkomprenigilon.

La litero mortigas, la spirito vivigas. En niaj koroj, en nia hardita volo ni starigu idealan monumenton, la sole indan de la genia sennaciulo el Bjalistok. E. L.

Diskutejo

Demando. — Pri la Statuto de S. A. T. „En la Statuto oni neniel rimarkas kian politikan tendencon havas tiu Asocio. Estas parolate pri klasaj interesoj (celoj) de la laboristaro tutmonda, sed ĉu do oni ne scias, ke granda parto de tiu aludita laboristaro estas nur vosto de la burĝaro dank' al kiu oftokaze nek strikoj, nek revolucio sukcesas. Estas necesaj ne nur klasaj celoj, sed revolucia konscio klasa. Neimageble estas kiel oni unuigos en unu Asocio la diversajn intertumultajn sektajn laboristajn! — ĉar ĉiuj celas sian liberigon, sed ne ĉiuj de ili alprenitaj vojoj kondukas al vera liberigo. Oni ja tre rajtas dubi pri la senerareco de nia Asocio. Nur unu vojo ŝajnas al mi ĝusta; ĝi estas la konscie revolucia. Ĉar kelke da sektaj opinias alie, S. A. T. devas klarigi kiu vojo estas sekvinda, al kiu Internaciano ĝi kondukas. Do, mi ne kritikas, sed petas klarigon por povi konkludi ĉu vere estas loko por ĉiu ajn internaciisto senescepte en nia Asocio? La klarigo estu publika en la presorgano, ne privata al mi.“

PETR TOŠKOV (Bulgario).

Respondo. — Nia Bulgara k.do estus prava, se S. A. T. celus, memstare kaj konkure kun la jam ekzistantaj klasbatalaj organizaĵoj, almiti la kapitalistan socion. Ĉu ne estus ridinda tia tasko? Ni estas nur kelkaj miloj da rev. esp.istoj en la tuta mondo!... Kiam ni estos tre multnombraj, jam esp.o estos oficiale akceptata de la diversaj internaciaj organizaĵoj, kaj tiam la tasko de S. A. T. verŝajne estos finiĝita. Plua respondo troviĝas en la ĉefartikolo de ĉi tiu n° — Red.



La Angulo de l' Poetoj

VIRA PREĜO

de L. Charles-Baudouin.

*En blankdezerta polvo kaj blindigantaj briloj,
Kie kraketadis senfine mil cikadoj kaj mil griloj,
Meze de suncindrigita somero
Estis viro, genuflekse klinata al la akra tero.*

*

*En kruciĝo de tri vojoj, li restadis tiel senmove
Nur la mano regule leviĝis kaj peze falis denove.*

*

*Nuda estis vojkruciĝo, sen ia kristo kalvaria,
Nek popolpsalmokantata bildeto de Sankta Maria.
La viro tamen ŝajne preĝis, laŭ rito, ritmo kaj fervoro:
Vera preĝo, vira preĝo, kies nomo estas laboro.*

*

*Ĉar li estis ŝtonrompisto kaj kiel multaj flamaj karboj,
Ŝtonfragmentoj sunfajreroj, ĉirkaŭ li flugis: ardaĵ garboj.*



LA TEKSISTOJ

H. Heine:

Tradukis D. A. Klačin.

*Kun malhelaj okuloj senlarmaj sidadas,
Je teksilo teksistoj kaj dentogrincadas;
Kadavraĵtukon Patrujo por ci ni teksas,
La trioblan malbenon en ĝin ni enteksas,
Ni teksas — ni teksas!*

*Malbenon al idoloj, adorataj diecoj,
Al kiuj ni preĝadis en malsategecoj,
Ni vane esperis kaj vane atendadis,
Ĝi nin simiigis, azenigis, mokadis!
Ni teksas — ni teksas!*

*Malbenon al la reĝo, la reĝ' de riĉuloj,
Ne demizeriginte la malfeliĉulojn.
La lastan spesdekon li de ni elprenadis
Kaj kiel la hundojn li nin mortpafigadis! —
Ni teksas — ni teksas!*

*Malbenon al la pseŭdega fipatrujaĉo,
Kie prosperas nur malhonoro, hontaĉo,
Kiu ĉiun floron jam fruege rompigas,
Kie putregado la vermon refreŝigas —
Ni teksas — ni teksas!*

*Balanciĝas bobenoj, teksilo krakadas,
Tage kaj nokte ni laboreme teksadas:
Kadavraĵtukon Patrujegaĉo ni teksas
La trioblan malbenon en ĝin ni enteksas —
Ni teksas — ni teksas!*



ESTONTECO

(Krajskij)

*Post ventego forta trankvileco venos
Ĝoja trankvileco de feliĉ', kareso.
Nia mondo paca kaj libera estos
Kiel oni diras en fabela verso.*

*Sango de l' mortintaj kamaradoj
La belegajn rozojn elkreskigos
Kaj en larmoj de la homploradoj
Kiel perlojn ilin kolorigos.*

*Klasoj, limoj, malriĉeco kaj riĉec.
El la mondo nova malaperos
Kaj radioj de liber' frateco, egalec'
En la koro ĉies lokon do konkoros.*

Elrusigis B. NAJDIN
Omsk, Siberio.



AKCESORAĴO

LA MALGRANDA REĜO KAJ LA SUNO

Fabelo de EDWIN HOERNLE⁽¹⁾

Jam estis malgranda reĝo, kiu ĉagreniĝis, ke la suno senmalhelpite leviĝis super la montojn. Li ordonis, ke ĝi estu atendanta, ĝis li permesus ĝian leviĝon. La suno ne atentis lin. Tial la malgranda reĝo ege ekkoleriĝis. Li ordonis al siaj kapitanoj alportigi ĉenojn kaj ŝnuregojn kaj venigi dek-mil soldatojn. Kaj la malgranda reĝo ĵuris, ke li kunligos la sunon al la tero.

La suno leviĝis pli kaj pli alten. La malgranda reĝo surrampis turon. Cirkaŭ la turo mil kanonoj estis stariĝitaj. De sur la supro de la turo li alkriis la sunon: »Mi estas pli granda ol ci!« Plue li ekbruligis lanternon kaj diris: »Ankaŭ mi lumas.« Sed la suno leviĝis pli alten. La arbaro malsupre ekmuĝis kaj la birdaro en ĝi ekkantis. Bestoj de la arbaro suriris la en matena krepusko brilegantajn herbejojn.

La malgranda reĝo tremis de kolero kaj timo. Liaj gregatoj eliris la domojn, rigardis la sunon kaj la malgrandan reĝon supre sur la turo. Tiu furiozis kaj kriis, ke li mortigos ĉiun, kiu kuraĝis aserti, ke la suno estas pli potenca ol li.

La gregatoj ektimiĝis.

Sed malgranda infano ekridis. Aro da infanoj malgrandaj ridis. La tuta infanaro ridis. Fine ridis ankaŭ la patrinoj kaj la patroj. Plue la maljunuloj, la gejunularo, eĉ la plej maljunaj avinoj ridis. Ĉiuj ridis.

La arboj, la bestoj, eĉ la plej malgrandaj herboj ridis. La ridado de la homoj, bestoj kaj herboj ekmuĝis kvazaŭ potenca ventego. Kaj ne plu ekzistis gregatoj.

Sed la malgranda reĝo rapide malsupreniris sian turon. La dungitoj de la reĝo kaŝiĝis rapide en siajn kelojn.

Sed la popolo elvenigis ilin el iliaj kaŝejoj, katerigis kaj devigis ilin maleviti la sunbrilon.

Poste ĉiu komencis sian laboron. Sed la infanetoj suriris la herbejon, dancis kaj kantis kaj la suno ridetis.

Esperantigis

SENNHEREDIGITO

La verkinto de tiu ĉi fabelo, estas 38 jara. En la junularaj jaroj li studadis teologion, filozofion kaj historion. Depost 1910 li laboris kiel redaktoro en la Socialdemokrata partio. Dum du jaroj li partoprenis la militon kaj estis membro de la »Spartakus-grupe« — bolŝevikoj —. Post la revolucio, en 1918, li laboris kiel redaktoro de komunistaj ĵurnaloj diversaj kaj estis prezidanto »aŭ plibone« estro de la kom. Partio, *Distrikto Würtemberg*. Nuntempe Ed. Hoernle laboras en la Centra-komitato de la Komunistaj Partio (sekcio de III^a Internacio) en Berlin.

Por disvastigi Esperanton meze de la laboristaro

Post kiam la rusa revolucio efikis tiel ege sur la tutmondan intelektan kaj politikan movadon, ankaŭ la esp.-movado nepre akiris praktikan karakteron. Esp.o iĝis fakte la internacia helpa lingvo, kiun miloj kaj milionoj da homoj nekleraj deziras lerni.

Tiu fakto, kies gravecon eble ne tute komprenas multaj fervoraj esp.istoj, devas, laŭ mia opinio, esti diskutata en nia gazetaro por solvi la demandon: *kiamaniere oni plejbone instruos al nekleruloj?* por ke ili povu, je l' fino de l' kurso, legi kaj skribi kompreneble, se ne perfekte, nian lingvon kaj uzi ĝin praktike.

Tiu *minimuma programo* ordinare ne estas atingata de la nunaj *kursoj por laboristoj*: kaj malgraŭ la fina ekzameno, la kursanoj ne povas poste pliperfektigi; ili, do, ne kreskigas la aron de la *veraj* esperantistoj.

Kiun ni kulpigos pri tio? — Certe, ne la propagandistojn nek la lernantojn, sed la metodon nem de la instruado.

Niaj laboristoj iafaje povas paroli eĉ france aŭ angle aŭ germane aŭ hispane, post longa forestado eksterlande, kvankam ili tute nescias la gramatikon de tiuj lingvoj, kaj ne eĉ tiun de la itala lingvo, kiun ili tute ne lernis aŭ jam forgesis. Male, la instruado de esp.o estas *ĉiam* farata laŭ gramatika metodo. Tio devenas unuflanke de l'sistemo mem, laŭ kiu nia helpa lingvo estis konstruata, aliaflanke de l' fakto, ke ĝis nun oni penadis preskaŭ ekskluzive por disvastigi ĝin meze de la *burĝoj*, kiuj jam scipovas ian lingvon krom sia propra.

La suprediritaj kondiĉoj okazigas maloportunaĵojn diversspecajn, kiuj riskas estingi la flamon por nia idealo, kiu brilas en diversaj «internacioj».

Kiel ni povos forigi tiel gravan danĝeron? — Mi estas ankoraŭ novulo, sed mi proponas diskutadon pri tiu temo.

D^r CARBONE

(*Esperantigis kaj mallongigis P. C. Monti*).

La Malsato

Ĵus kiam la rusa popolo finis militi kontraŭ diversspecaj reĝoj, generaloj ktp., kaj intencis iom ripozi post la tiamaj suferegoj, nova potenca tirano kunigis siajn fortojn por dispremi la elturmentitan popolon. La legantoj certe scias ĝian nomon. Ĝi estas *Malsato*.

Longdaŭra sekeco forbruligis preskaŭ la tutan rikolton en vasta apud Volga regiono, komencante de la urbo Kazanĵ (nuna Tataraj Respubliko) kaj pluen laŭ la fluo de

Volga. La mizero tie estas grandega. Ja, dum antaŭaj jaroj la registaro por nutri la ruĝarmeon kaj laboristaron forprenis de la vilaĝanoj tutan rikolton, lasinte nur difinitan normon por la familianoj kaj por prisemi la kampojn. Tiel oni ne povis konservi panon por tia okazo, kaj kiam la kampoj donis nenion, ĉiuj vilaĝanoj ekestis antaŭ plej proksima morto. Teruraĵoj ofte okazas tie. Sidante en sia komforta kabineto, oni ne povas prezenti al si tian bildon. Jam aŭtune, ofte ĉiuj loĝantoj de pluraj vilaĝoj forlasis siajn domojn kaj formigris en aliajn guberniojn. Multaj veturis vaporŝipe, fervoje, ankoraŭ pli multaj sur ĉaroj, enjunginte sian ĉevalaĉon kaj metinte sur la ĉaron tutan sian havaĵon. Mem homoj apude piediris kune kun la ofte multnombraj infanoj. Se ia vilaĝano estis pli riĉa, tiam lin postsekvis, alligita al la ĉaro, malgrasa bovino aŭ kaprino. Nia urbo estas apuda al la malsata regiono kaj mi ofte vidis tiujn kompatindajn ĉifonitajn malfeliĉulojn... Oni rimarku, ke apud Volga vivas krom rusoj ankaŭ Tataroj kaj diversaj gentoj el la posteuloj de la Finnoj, iam vivintaj ĉitie. Ili estas ankoraŭ pli necivilizitaj ol rusaj vilaĝanoj. Ilia malklereco kaj malpureco estas grandegaj; sekve de tio, epidemioj ĉiam faras tie multe da viktimoj kaj rapide disvastiĝas. Jam aperis multaj malsaniĝoj pro tifo diverspeca. Kelkfoje mi vidis, vaporŝipojn, plenajn de malsatantoj (plejmulte Tataroj). La Registaro veturigis ilin Peterburgon por doni al ili tie ian kelktempan laboron. Ĥoro disŝiriĝas rigardante ilin. Oni donas al ĉiu homo po unu funto da pano ĉiutage, kaj eĉ ne akurate, sed ili kontentiĝas je tio. Malgrasaj, flavaj vizaĝoj montras grandan malfortigon.

Certe Sovjetregistaro ĉion eblan faras por helpi al mizeruloj, sed ĝiaj rimedoj estas multe nesufiĉaj. Longaj militoj, industria ruiniĝo ktp., malriĉigis la ŝtatan kason. Tuta rusa popolo estas alvokita por helpi. Komence oni fondis *Tutrusian Komitaton* por helpi al la malsatantoj el ĉiuj klasoj de la loĝantaro, ĝis burĝoj inkluzive, sed laŭ diroj de Sovjetgazetaro, ĝi pli multe okupis sin pri helpo al kontraŭrevolucionoj, ol al la malsatantoj. Tial ĝi estis forpermesita. Nun la tutan aferon gvidas speciala komisiono ĉe V.C.i.K. (tutruslanda centra plenuma komitato). Per multaj penoj oni sukcesis jam doni en la malsataj regionoj semojn por 1922, el la ricevita «natura imposto». Sed oni bezonas nutri la malsatantojn dum la vintro kaj plej granda parto de l'venonta somero.

Multaj Kolektoj inter la loĝantaro estas farataj; koncertoj, spektakloj, helpcele okazas, Gazetoj eldonis specialajn aĉetebajn numerojn, kies tuta sumo estas por la helpo, sed ĉio ĉi ne sufiĉas, Ruiniĝinta Rusio ne povas mem forigi la malsaton, Necesas eksterlanda helpo kaj plej baldaŭ. Oni atentu, ke la supre nomita komisiono kalkulis, ke por pli malpli bona helpo tuj necesas unu triliono da rubloj! Tial ne longe hezitu. Alie via helpo trovos nur kadavrojn.

HERMANN KONOVALOV (Nijnij-Novgorod).

S.A.T.-a Monkolekto por la malsataj Rusoj

(III^a listo de monoferantoj)

K^{doj} Filiatre 5.—, Rousseau 5.—, Raguier 5.—, E. Lanty 10.—, J. Habert 5.—, Szylagyi 10.—, Bannier 5.—, Raulin 5.—, Coldefy 20.—, K^{inoj} C. Besnard 5.—, T. Besnard 10.— (ĉiuj en Paris), Hemy 5.— ope = 90.— (kun la antaŭaj listoj = 225 fr.fr.) Leipzig'a grupo, kunveno de 27 okt = 136 Mk. (kun la antaŭaj listoj = 146 Mk.G.)

La K^{doj} el Dresden kolektis sumon da 300 Mk. kiun ili sendis Rusion senpere.

Por Komencantoj.

Proverboj, (El la rusa lingvo).

Kiu timas la lupojn, ne iru en la arbaron. — En la bela printempo la floroj, en la aŭtuno la fruktoj. — Pacienco kaj penado traboras ĉion. — Donacanta mano ne malriĉigas. — Ne kraĉu en la puton; ĉar eble vi iam devos trinki el ĝi. — Ne preĝu pro longa, sed pro varma somero! — Hodiaŭan taskon ne prokrastu ĝis morgaŭ. — Malsaĝa amiko estas danĝera malamiko. — Laŭdu la pomon nur, postkiam ĝi estas distranĉita. — Kiam pluvus rublojn, oni ne havas sakon; kiam oni havas sakon, ne pluvus rublojn. — Ne aĉetu la broson, antaŭ ol vi posedas la ĉapelon. — Unu putra kukumo malbonigas dek sanajn. — Kiam kato vidas muson, ĝi tuj forgesas la solenan promeson de sinretenado. — Amu min, kiam mi estas nigra; ĉar kiam mi estas blanka, ĉiuj amas min. — Unu malnova amiko estas pli bona ol du novaj. — La aglo naskas aglon; sed strigo nur naskas strigon. — Ora ŝlosilo malfermas la koron eĉ de la caro. — Kiu silentas, kies lango ne doloras. — Vian pelton batu forte, vian edzinon dolĉe.

Aforismoj.

Ekzistas nek patriota arto, nek patriota scienco. Ambaŭ apartenas, kiel ĉia alta bono, al la tutmondo, kaj povas esti akcelataj nur per ĝenerala, libera reciproka efikado de ĉiuj samtempe vivantoj kun ĉiama konsidero al tio, kio estas al ili restinta kaj konata el la estinteco.

W. GOETHE.

Oni dankas al la mortintoj tiel, ke oni akcelas la ideojn de ilia vivo; ke oni daŭrigas, kion ili komencis; ke oni efektiviĝas, kion ili volis.

A. DIESTERWEG.

Ĉion, kion vi deziras, ke la homoj faru al vi, tion vi faru al ili.

JESUO, Mat. VII. 2.

La tagoj estas la folioj en la libro de via vivo. Tial enskribu nenion escepte de bonaj faroj kaj idealaj penoj.

PERSA.

Estas pli facile, per pinglo ŝiri montaron for de ĝiaj radikoj, ol eligi la egoismon el la koro.

PERSA.

La homo ne vidas la danĝeron, li vidas nur la profiton; la fiŝo ne vidas la kaptilon, ĝi vidas nur la logmanĝaĵon.

ĈINA.

Granda riĉeco estas akirata nur per mizero de malriĉuloj.

L. TOLSTOJ.

Ne ekzistas io, kio estas malpli dubebla ol la morto, kin atendas ĉiun el ni; kaj tamen ĉiuj vivas tiel, kvazaŭ ĝi ne ekzistus.

L. TOLSTOJ.

Divido (rakonto el la rusa lingvo).

Vivis malriĉa vilaĝano; multaj infanoj, sed la havo nur unu ansero. Li amis kaj gardis ĝin, sed la malsato ne estas indulgema: kiam la lasta peco da pano estis malaperinta, li devis mortigi la birdon. Li preparis, rostis kaj metis ĝin sur la tablon. Ĉio estis bona, sed malfeliĉe la pano mankis. Tiam la vilaĝano diris al nia edzino: „Kiel ni manĝos la anseron sen pano? Mi preferas ĝin porti al nia sinjoro, kaj li donos al ni rekompence panon.“ Tiel li faris. Li venis al la sinjoro kaj diris: „Volu akcepti mian donacon.“ La sinjoro dankis kaj diris: „Bone, mia kara. Vi scias, ke mi havas edzinon, du filojn kaj du filinojn. Dividu vian anseron tiel, ke ĉiuj ricevu konvenan parton.“ La vilaĝano prenis tranĉilon kaj komencis partigon de la ansero. Li fortranĉis la kapon kaj donis ĝin al la sinjoro: „Vi estas la kapo de la familio, sekve al vi konvenas la kapo.“ Poste li disigis la postajon de la birdo kaj donis ĝin al la sinjorino. „Vi devas ĉiam sidi dome, por observi la ordon.“ Farinte tion ĉi, li detranĉis la flugilojn kaj prezentis ilin al la filinoj: „Vi nelonge kunvivis kun viaj gepatroj; vi fianĉiniĝos kaj forflugos al viaj edzoj.“ Fine li detranĉis ambaŭ piedojn kaj proponis ilin al la du filoj: „Prenu, sinjoroj, ĉiu po unu piedo, por sekvi la vojon de via patro.“ Nun la vilaĝano prenis por si la reston dirante: „Mia parte mi estas malsaĝa vilaĝano kiu pensas nur pri la stomako; tial al mi restas nur, kontentiĝi je la maldelikata internaĵo.“ La sinjoro ekridis kaj malavare rekompensis la spiritulon.

Unu el la najbaroj, riĉa vilaĝano, sciigis tiun ĉi faron kaj enviis la malriĉulon. Li elektis kvin grasajn anserojn kaj alportis ilin al la sinjoro: „Volu akcepti mian donacon,“ li diris: Mi dankas vin: ĉu vi ne volas dividi vian donacon tiel, ke ni ĉiuj ricevu konvenan parton?“ La vilaĝano provis fari la dividon, sed konvenan partigon li ne atingis. Kiel dividi kvin anserojn en ses partojn? — Tiam la sinjoro venigis la malriĉan vilaĝanon kaj al li ordonis, fari la partigon. La vilaĝano prenis unu anseron, donis ĝin al la gesinjoroj kaj diris: „Nun vi estas trio.“ La duan anseron li donis al ambaŭ filinoj kaj diris: „Nun vi ankaŭ estas trio.“ La trian anseron li donis al la du filoj: „Viavice vi ankaŭ estas nun trio.“ La restantajn du anserojn li prenis por si kaj diris: „Kiel ĉiuj, mi ankaŭ estas trio.“ La sinjoro ricevis de tio plezuron kaj rekompensis la spritan vilaĝanon, dum la enŭilo foriris tute konfuza sen siaj anseroj.

Tradukis A. Kofman.

El „Tra la Mondo“ de PAUL BENNEMAN, internacia legolibro recenzata sur alia paĝo.

Inter ni.

Sur alia paĝo ni ciferas la figuron de niaj financoj. Je la 1 decembro 1921, nia kaso entenis 321,25 fr-fr., plus kelkajn centojn da alilandaj monunuoj' kies valoro estas kvazaŭ bagatelo kompare kun la prezo de la fakturoj de nia presisto. Kaj, ni ne ankoraŭ pagis la novembran (fuŝitan...) numeron.

Malĝojiga estas la konsidero de tiu tabelo; ni eniras, aŭ pli-ĝuste, ni daŭras trairi krizan periodon. La plialtiĝo de la abonprezo ne ankoraŭ donis sian plenefikon (ĉar ĉiuj abononj ne finiĝas samdate), sed precipe la falo de la monkurzoj perturbas niajn buĝet-problemojn; en tiaj cirkonstancoj estas tre malfacile certigi la ekvilibron financon de unu universala entrepreno.

Ĉu do senelira estas la krizo? Ĉu ni dronos? Jes, se ni lasos nin subakvigi — ne, se ni persiste naĝos kontraŭ-fluen. La situacio postulas de ĉiu flegmon kaj obstinon pli ol malesperon kaj cedemon.

Ĉu nia Revuo estas helpinda? — jesa respondo estas la multo da laŭdplenaj leteroj kuŝantaj antaŭ ni.

Ĉu nia Revuo estas helpata? — jes, ni mem respondas, sed ne sufiĉe — — —

Unuadeve, ĉiu leganto de Sennacieca Revuo varbu almenaŭ unu novan abonon, ĉar nia financo atingos normalan ekvilibron nur, kiam la produkto de la abononj nutros senhelpe la gazeton.

Dumĝise, ni estos devigataj alpeti vian malavarecon.

Sendu, sendu monon, kolektu multe en viaj grupoj, helpu ĉiel, sed precipe varbu abononj.

* * *

Ĉu ni devas enpresii pornegocajn reklamojn en Sennacieca Revuo? Je tiu demando' ni tuj inklinitis malakcepti, ĉar prezentiĝis je nia penso, tiuj 12 — 16 paĝaj gazetoj esperantistaj kiuj oferas al sia legantaro 2 eĉ 3 paĝojn reklampenajn; ni pensis al tiuj ĵurnalistoj, kiuj preferas profitdonan reklamon ol bonan artikolon.

Tamen, tamen, la stato de nia kaso ne nin rajtigas fanfaroni; bedaŭrinde, la mono estas la *nervo* de ĉiuj entreprenoj, kaj ni bezonas monon.

Ĉu nia Revuo devojiĝos tial ĉar ĝi enakceptos reklamojn? Ne, ni garantias ke la komercista mono neniel influos nek makulos la celon de nia Revuo; cetere, ni restos liberaj en la elekto de la reklamoj.

Antaŭ ol decidi, ni submetas tiun proponon je la meditado de niaj kamaradoj. Ni scivolas ilian opinion.

La administranto de S.R.

Financa situacio de Sennacieca Revuo

(1 Julio 1921 — 30 Novembro 1921)

Enspezoj:	En fr. frankoj:
En kaso la 1 Julio 1921	61.55
Abononj ricevitaj de 1 Julio ĝis 30 Novembro	1250.90
Monhelpoj	830.20
Anoncoj	29.—
Ponumera vendado	122.75
Benefico de nia librejo	93.75
Prunto de K-do E. Lanty	500.—
	<hr/> 2888.15

Elspezoj:

Fakturoj de nia presisto (n-oj Juli-Aug., kaj oktobro)	2103.—
Fakturoj de nia klišisto	163.65
Ekspedo de la gazeto	119.50
Poŝtelspezoj	26.25
Diversaj	14.50
Amortizo de nia ŝuldo ⁽¹⁾	140.—
	<hr/> 2566.90
En kazo la 30 Novembro 1921 ⁽²⁾	<hr/> 321.25

(1) Nia ŝuldo al K-do E. Lanty sumas 1763.50 fr.

(2) Plus la ĵena kvanto da diversaj monbiletoj, kiun ni ne ankoraŭ ŝanĝis: 2641 mkg., 739 kr. ĉek., 790 mkp., 210 mkf., 20 mk. est., 250 lev. rum., 390 lev. bulg., 30 din., 540 kr. hung.

Mirindaĵoj de la profunda Maro

La tiel nomata "profunda maro" estas unu el la plej vastaj loĝejoj de vivantaj estaĵoj, kaj certe la plej stranga. Neniu homo ĝin vidis, kaj kredeble neniu ĝin iam vidos, kvankam iu ajn persono sur ŝipo transiranta la oceanon povas ĵeti pezan objekton en la profundajn. Tamen, ni scias ion pri la multnombra loĝantaro de tiu mistera regiono, pere de la longa brakoj de la dragilo, kiu malsupreniras kaj reportas al ni ĉiuj specajn objektojn el la abismoj.

Antaŭ proksimume kvardek jaroj okazis unu el la grandaj historiaj vojaĝoj de esplorado, nome la *Ekspedicio Challenger*. Oni eĉ nomis ĝin "vojaĝo de Kolombo", ĉar ĝi malkaŝis al ni tute novan mondon la mondon de la profunda maro. Unue, ĝi montris al ni, ke la profunda maro ja estas profunda; ĝi havas mezan profundon de kelkaj kilometroj, kaj estas 'profundegaĵoj de ok ĝis dek kilometroj, en kelkajn el kiuj oni povas meti la Monton *Everest* (la plej alta monto en la mondo) kaj eĉ tiu montego estus kovrata per la akvo.

En tiuj abismoj ne estas eĉ la plej malgranda radio de lumo, krom tiu de la tie trovataj fosforeskaj animaloj. La lumo penetras nur ĝis profundo de kelkcentoj, eble ĝis milo, da metroj; tion oni konstatis pere de fotografaj kliŝoj, enakvigitaj ĝis diversaj punktoj kaj espozitaj per speciala mekanismo. Oni ankaŭ subakvigas termometrojn, kaj vazojn kiuj aŭtomate malfermiĝas kaj refermiĝas, en kiuj oni kolektas specimenojn de la akvo de la abismoj per tiuj procedoj ni eksciis, ke en la plej profunda maro la akvo havas temperaturon preskaŭ de frostpunkto.

Do, en tiuj regionoj ekzistas nek sezonoj, nek tagoj kaj noktoj; nur eterna nokto kaj eterna vintro. Plue, estas tie neniuj ŝtormoj aŭ uraganoj; la akvo neniam maltrankviliĝas, kaj preskaŭ ne estas ia fluo de la akvo; nenio influas la eternan serenon de la profunda maro. Tamen, kvankam en tiuj profundajoj ne estas plantoj, estas multege da animaloj, malsimilaj grandparte al tiuj de ni konataj en la supra akvo de la maro. Kiamaniere ili vivas kaj nutriĝas? Nu, ŝajne la fiŝoj manĝas la moluskojn; la moluskoj manĝas la vermojn, kaj aliaj vermoj aliajn vermojn; sed fine ĉiuj dependas je unu konstanta fonto de manĝaĵoj, nome la senĉesa pluvo de etaj organismoj kiuj pasigas la vivon en la supra akvo, kaj, mortinte, grade fundeniĝas. Ankaŭ en ia grado ili uzas por nutraĵo la kadavrojn de balenoj, ŝarkoj, kaj aliaj bestoj aŭ fiŝoj simile fundeniĝintaj. La kadavroj ne putriĝas en la profundajoj, ĉar por putriĝo necesas bakterioj, kiuj ne ekzistas en la abismoj de la oceano; sed la loĝantoj de tiu regiono formanĝas la kadavrojn, ĝis restas nur kelkaj ostoj.

Se ordinara fiŝo el la supra akvo estus metita en la profundegajn, ĝi tuj mortus, pro la terura premo de la superkuŝanta akvo. Tamen ŝajnas preskaŭ certe, ke la loĝantoj de la profunda maro evoluiĝis el estaĵoj antaŭe vivintaj sur la supraĵo, grade ŝanĝinte sian formon kaj naturon dum la evoluado. Estas strange noti, ke kelkaj el la fiŝoj de la abismo havas grandegajn okulojn, sed aliaj nur tre ege malgrandajn — fenomenaj diferencoj ĝis nun neklarigeblaj. Plue, oni ankoraŭ ne bone klarigis la fosforeskeron de diversaj specoj, kvankam teorioj ne mankas — ekzemple, ke la lumo efikas kiel gvidilo al la fiŝo, aŭ al aliaj fiŝoj; ke ĝi altiras al la fiŝo manĝeblajn bestojn; ke ĝi formas kvazaŭ specialan fosforeskan desegnon por montri la fiŝon al aliaj samspecaj. Eĉ estas almenaŭ unu speco kiu portas du lumojn: unu ruĝa, la alia verda.

Jen nur kelkaj el la neklarigitaj (kaj eble por ni neklarigeblaj) misteroj de la profunda maro; malluma, malvarma regiono, neniam explorebla per efektiva vizito, kvankam tute proksima al la sunlumigata mondo en kiu ni vivas. —

Verdano (El "Literaturo", n° 10).

Elĉerpajoj

"Estas necese, ke la tuta Esperantistaro penu por faciligi la baldaŭan realigon de la bezonataj teknikaj vortaroj, memorante ke aliaj internaciaj lingvoj posedas jam fakajn vortarojn, kiujn ankoraŭ ni ne havas".

ALBERTO ALESSIO (L' Esperanto, n° 10).

*

"Se la Esperantistoj estus zorgintaj pri la necesaj monrimedoj, eble ili havus rajton peti klarigojn kaj kritiki." (S^o Warden ĉe la XII^a Kongreso). "El tio sekvas, ke niaj, 'oficialaj' institucioj estas pagataj de kelkaj riĉaj sinjoroj, kiuj, ĉar ili ja pagas ĉion, ne permesas kritikojn kaj ankaŭ ne donas al ni la rajton, peti klarigojn. Tiaj institucioj, laŭ tutmonda kompreno pri moralo, ne rajtas nomi sin 'oficialaj', kaj ili ankaŭ ne havas la rajton, paroli kaj agi en la nomo de la Esperantistaro: ili estas privataj entreprenoj."

(Internacia Komerca Revuo, n° 19/20).

*

"En la Komerca akademio de Praha estas instruata Ido! Tio okazas en sidejo de Ĉeĥoslovaka Asocio Esperantista post la XIII. esp.kongreso, kiun ĉeestis S^o Ŝusta, la ministro por publika instruado."

(La Progreso, n° 9.)

Moralaj pripensoj

Estas malfacile ami ti-kiujn ni ne estimas, sed ne estas malpli ami ti-kiujn ni estimas pli ol nin.



En la ĵaluzeco estas pli da memamo ol da amo.



Konfido pli provizas la konversacion ol spriteco.



Nia saĝeco ne estas malpli en la povo de la sorto ol niaj bienoj.



Oni malmulte parolas, kiam vanteco ne igas paroli.



La kaŭzo pro kiu ni amas la novajn konatojn ne estas tiom laciĝo pro la malnovaj, aŭ la plezuro ŝanĝi, ol tede ne esti sufiĉe admirataj de ti-kiuj nin tro konas kaj espero esti pli admirataj de ti-kiuj nin ne tiom konas.

LA ROCHEFOUCAULD.

LETERO EL PORTUGALUJO⁽¹⁾

Kelkfoje mi legis en tiu ĉi revuo iajn notetojn pri la silento de l'portugalaj esp-toj. Mi volas iom klarigi pri tio. En Portugalujo, la ĉefa organizaĵo estas, la laborista societo »Lisbona Verda Stelo«. Ĝiaj anoj devenas el revoluciaj sindikalistoj, anarkianoj kaj aliaj amikoj de la C. G. T. Ĉar »S. A. T.« inklinas al la Tria Internacio, ni, kvankam admirante la rusan revolucion, neniel akceptas la moskova-programon. Certe la anarkianoj ne povas kunlabori kune kun gregistaranoj ĉu estu ili ruĝaj aŭ flavaj. Se S. T. A. estus neŭtrala laŭ la antaŭenemaj vidpunktoj, inter ni ĝi trovus fervorajn anojn. Samopinias la societoj kaj grupoj kiuj funkcias ĉe la orbito de l'Laborista esp. organizaĵo. Antaŭe la antaŭenemuloj marŝas la anarkia grupo »La Vero«, el Lisbono, kiu akceptas la starigon de tutmonda asocio de esp. anarkianoj.

En tiu ĉi lando la komunistoj kontraŭbatalas nin. Pro tio oni komprenu la kaŭzon de nia silento pri S. A. T.

Ekster la laborista esp. organizaĵo estas du esp. grupoj, unu el policistoj kaj alia el komunistoj. Kvankam »S. A. T.« ne plaĉas al port. esp. laboristaro, ĝia organo »Sennacieca Revuo«, estas bone akceptita ĉe ili kaj se ne estis nia malbona monŝanĝa situacio, ĝi trovus inter ni multajn abonantojn.

FRANCISKO COSTA

(1) Ni enmetis tiun leteron, tial ke ĝi estas interesa pro la stranga spiritstato, kiun ĝi spegulas. Verŝajne la esp.-vortoj ne havas la saman sencon en Portugalio kiel en aliaj landoj. Nur en tiu lando oni absolute miskomprenis la celon de S. A. T. Ni povas do nur konsili al niaj Portugalaj samidealanoj, ke ili relegu atente la Statuton kaj la Rezolucion voĉdonitajn en Praha.

Stranga ankaŭ estas la diro pri malbona monŝanĝa situacio en Portugalio rilate al Francio. Jes ja, la esp. vortoj ne havas ĉie la saman sencon. — Red.

Noto de la Redakcio

Malgraŭ plej atentema zorgo, okazas ke preseraroj enŝoviĝas en la gazeto. Kiam ili riskas miskomprenigi la sencon de la teksto, ni kutimas korekti en sekvanta n^o. Kaj tio neniam necesigas multe da loko. Por reĝustigi ĉion el la lasta n^o, ni bezonus tutan kolonon. Ĝi estas vera fuŝaĵo por kiu ni malakceptas iun ajn respondecon: *Ni ne vidis la presprovaĵojn, kaj konsekvence ne subskribis la prespermeson.* Niaj legantoj bonvolu do kredi, ke la Redaktoro ne farigis subite majstra fuŝisto kaj senzorgulo.

De nun, S. R. estos presata en *Leipsig*. Kredeble nia germana presisto zorge prilaboros ĝin, kaj tiel forigos el la memoro de niaj legantoj ĉian malbonan impreson pri la fuŝita novembro n^o. Estonte ni esperas liveri tre akurate la gazeton, kun pli kaj pli bona aspekto kaj valora enhavo, por kontentigo de ĉiuj niaj abonantoj. — Red.

KRONIKO

Brazilio

Rio de Janeiro. — Fondiĝis: »Laboristo Esp. Grupo". Adreso: rua Jose Mauricio 51. Sekretario: Antonio Vaz.

Francio

Lyon (Villeurbanne). — Dum kongreso de franclingve parolantaj anarkiistoj. La demando pri lingvo Internacia estis en la tagordo. Parolis esp.isto kaj idisto, sekve de kio la Kongreso unuanime alprenis la jenan rezolucion:

«La anarkiistoj konfesas la necescon de L. I. Sed, ĉar ili ne kapablas juĝi pri la respektiva valoro de esp-o kaj de ido, ne volas alpreni unu prefere al alia. Li lasas al la proksima Kongreso internacia la zorgon diskuti kaj decidi pri tiu demando.»

La esp. anarkiistoj trafe agus, skribante pri la afero al »Le Liberaire«, 69, rue de Belleville Paris.

Paris. — Ĉe la Kongreso de Sindikatunuigo el la departemento Seine, okazinta la 27. Nov. 1921, k^{do} Jacquemotte proponis la ĉi suban deziresprimon, kiu estis ĉiuvoĉe akceptita:

«La Kongreso, rememorigante pri la deziresprimoj jam voĉdonitaj ĉe la Konfederaciaj Kongresoj en Le Havre (1912) kaj en Lyon (1919) favore al la internacia lingvo esp.o:

Instigas la Intersindikatajn Komitatojn, ke ili laŭeble partoprenu en la poresperanta propagando;

I. Malrifuzante ejojn al la esperantistaj kamaradoj revoluciaj por iliaj kursoj kaj paroladoj;

II. Konigante kiel eble plej al siaj membroj la principan intereson, kiun havas nun la praktika solvo de tiu demando;

III. Difinante lokon en la korporaciaj gazetoj por pritrakti la priesperantan demandon.

Francio

Troyes (Aube). — La grupo »Liberiga Stelo« organizis novan kurson ĉe la Laborborso. 50 lernantoj partoprenas tiun kurson, kiu estas gvidata de K^{do} Hugot-Raison. Plie multaj personoj kaj organizaĵoj neesperantistaj subtenas la grupon pagante kotizaĵojn kaj aliĝante S. A. T. Jam la grupo kalkulas 80 membrojn. — En Arcis-sur-Aube, urbeto apud Troyes, K^{do} Hugot sukcesis fondi grupeton. Li organizis kurson kaj 15 lernantoj estas jam enskribitaj. — Ĉiusemajne la komunista gazeto »la Dépêche de l'Aube« publikigas artikolon por esperanto. — La propagandon daŭrigas la grupo »Liberiga Stelo« en Troyes kaj aliaj urboj ĉirkaŭe de Troyes. Ĝi ĵus aĉetis grandan ruĝan flagon kun meze de ĝi verda stelo en kiu brilas origitaj literoj S. A. T. Propagandilo certe estas tiu flago!

Germanio

Riesa-Gröba. — La ĉitea Laborista Grupo malfermis 2 kursojn: 1 en Riesa (23 p.) la alia en Gröba (17 p.). Alia kurso por perfektigantoj funkcias ĉiujauĉe en la Popoldomo de Riesa (9 p.).

Erfurt. — Nia grupo estas dekduembra. Ni gvidas kurson ĉeestata de 15 p. en urba lernejo ĉiumarde. Nia kunvenloko estas la restoracio: Fürst Blücher. La Prez. Max Ebnrenfraank, Oststr. 1.

München. — Distrikta kunveno okazos la 11 an kaj 12 an en Rest: »Baugenossenschaft« Donnersbergerstr. 29. Ĉiuj grupoj en la propaganda teritorio Sud-germana estas petataj, ke ili sendu delegitojn. Izoluloj kore invitataj. Oni sin anoncu ĉe: K^{do} Konrad Deubler, Arcisstr. 40, II. r., München.

Norvegio

Kristiana. — Grava organizaĵo de librobindistoj decidis uzi praktike esp.on en nia faka presorgano »Norsk bokbindertidende«. Jam aperis artikolo en nia lingvo. Tiu organizaĵo petas, ke oni diskonigu sian iniciaton' al ĉiuj aliaj metiaj organizaĵoj, por ke ili sekvu la ekzemplon. La redakton de la ĉi supre citita gazeto,

do Hans Aas, deziras, ke oni sendu al li informojn kaj sugestojn por sukcesigi sian entreprenon. Adreso: Bokbinderforbundet, Folkets fiis. Kristiana. (Norvegio).

Portugaliao

Lisboa. — En la anarkia gazeto «A Comuna» (La Komunumo) aperis artikoloj pri esp.o. — En «Despertar» (Veki), organo de l' Sindikalista Gejunularo, aperas esp.a fako. — Post klopodoj de l' esp.lab.organizo la fervojista konferenco aprobis esp.on por eksteraj rilatoj en la estonta «Fervojlaborista Federacio». — «Laboro» malaperis de Februaro pro grandaj registaraj impostoj. Eble nova gazeto aperos (sekrete) je Januaro.

Polio

Varsovio. — La pola laboristaro ekinteresiĝas pri esp.o. La esp. societo «Laboro» entreprenis viglan propagandon. La 6. Nov. en loĝejo de la Varsovia regiona Komitato de Pola Socialista Partio, okazis propaganda parolado de K^{do} K. DOMOSLAWSKI. Ankaŭ en la provinco, «Laboro» fonda lokajn filiojn, Lodz kaj aliaj urboj. La plej gravaj laboristaj gazetoj kiel «Robotnik» (centra organo de P.P.S.) «Trybuna» (semajno soc. gazeto) «Swiat Pracy» (organo de kooperativaj lab. soc.) kaj multaj aliaj enpresis nian alvokon, kiu faris tre bonan efikon. En Varsovio «Laboro» gvidas nun 4 kursojn kun ĉ. 60 lernantoj. Unu el tiuj kursoj estas pure laborista, la unua en Varsovio. Kursoj okazas en popola lernejo ĉe la str. Wspolna 47.A. — Dum la ĝenerala Kunsido de la societo estis elektita nova estraro. Rez. R. KESICKI, v. pr. K. DOMOSLAWSKI. sekr. A. Hartmann.

U. S. A.

New-York. — Samideano G. SAVILLE, bakisto, proponis al sia profesia unuiĝo la akcepton kaj enkondukon de esp.o. La ĉefa sekretario, K^{do} THUMAN, invitis la grupon *Esp. Lab. Centro*, ke ĝi sendu tri kamaradan delegitaron al la kunsido de la bakistunuiĝo. K^{do} KLAĜIN konvinkis la bakistaron pri la neceseco de esp.o en unuiĝo konsistanta el diversnacioj ne konantaj la anglan lingvon. La 26. Nov., unuanime la ekzekutiva komitato akceptis la proponon pri enkonduko de esp.o, rekomendante al ĉiuj membroj, ke ili lernu la lingvon. — La unuiĝo de bakistoj havas pli ol 4000 membrojn kaj apartenas al la *Amalgamated Evod Worker*. Tio estas la unua sukceso de la *Esp. Lab. Centro*. Estas necese, ke de nun ĉiuj aliaj Esp. Societoj vizitu la bakistunuiĝojn de sia urbo kaj instigu ilin imiti la New-Yorkan bakist-laboristaron.

NOVULO

Rusio

Laŭ decido de la Centra Komitato de Sovjetlanda Esperantista Unuiĝo kaj kun permeso de la Loka Registaro (Gubispolkom, t. e. Gubernia Plenumiga Komitato) en Petrograd, de la 15-a ĝis la 16-a de Novembro 1921, okazis la

Unua Nordrusa Konferenco Esperantista,

kiun partoprenis reprezentantoj jenaj 10 gubernioj de l' Nord-regiono: Arhangelska, Vologda, Vjatka, Novgoroda, Oloneca, Pskova, Petrograda, Cerepoveca, Tvera kaj Korelia.

La konferencon partoprenis delegitoj el 7 gubernioj de l' Nordrusa Regiono, sume 27 delegitoj kiuj reprezentis 18 diversajn organizaĵojn.

Laŭ nacieco estis: 16 rusoj, 3 estoj, 3 sennaciuloj, 2 latvoj, 1 esperantisto-internacianisto, 1 polo kaj 1 hebrea.

Laŭ partieco estis 4 komunistoj, 12 senpartianoj kaj 1 ne montris partiecon.

Plensukcesa estis la konferenco.

Akceptitaj rezolucioj kaj aliaj detaloj estos sendataj.

Je la nomo de l'Organiza Komitato kaj Prezidantaro de l'Konferenco.

Sekretario H. ĈAĈE.

Adreso: Petrogrado, Italianskaja 31 (Sekretario Petrograda Esperantista Societo „Espero“).



RECENZEJO

Libroj

Cours Rationnel et Complet d'Esperanto. Préface de Henri Barbusse. Formato: 13 X 20. Prezo: 5.50 fr. fr. afrankite. Eldonita de *Fédération Esperantiste Révolutionnaire*, 23bis rue Morère Paris (14^e).

Estas agrabla kaj samtempe malfacila tasko recenzi verkon de amiko. Oni votus laŭdi senrezerve, sed tiaokaze estiĝas ĉe oni spirito la penso ĉu la amikeco ne nebuligas la sagacecon la juĝon? Tiel mi estas tre kontenta povi nur citi la recenzon aperintan en *Esperanto Triumfonta*:

“Ni povus esti tre kontentaj, se ekzistus nur tiaj instrulibro, kia estas la jena por franclingvaj laboristoj. Ili danku la verkinton kaj ĉiujn, kiuj per malavaraĵoj mondonacoj ebligis la eldonon de la kompleta gramatiko.

Henri Barbusse desegnas en la antaŭparolo la konturojn de Esp-o kiel idealon socialan kaj moralan de l'nuntempo. Li finas dirante, ke ĉiu socialisto devas esti esperantisto.

Per klarigaj vortoj la aŭtoro en aparta ĉapitro enkondukas la lernanton en la historion, esencon kaj celon de nia lingvo. La sekvanta ĉapitraro konsistas el 29 lecionoj, aldono de la radikaro esperanta kaj vortaro franca-esperanta. La finlerninto estas invitata al aliĝo al *Sennacieca Asocio Tutmonda* (S. A. T.) per la alvoko: Ni estu vere internaciistoj!

Antaŭ ol komenci la lecionojn, la verkinto laŭdinde (kaj tre ĵetitinde!) donas resumon pri la franca gramatiko koncize kaj klare, por ke la lernanto ree konatiĝu kun la reguloj de la lingvo gepatra, kies funda kono faciligas la lernadon de artefarita — kaj tamen vivanta — lingvo. Prepara leciono parolas pri la alfabeto, la akcento kaj la prononcado.

Ĉiun lecionon ornamas bildoj, kies parto genia kunmetiĝo komprenigas eĉ ĉiujn lingvajn malfacilaĵojn al ne tre inteligenta persono. Ili bonege povas anstataŭi la instruiston, jam pro tio ke la klarigoj estas abundaj. Sed laŭ la arango la gramatiko estas destinita por kursoj.

Speciala ĉapitro pritraktas, idiotismojn pensigante la lernanton en Esp-o kaj ne en la gepatra lingvo, se rilatas al tradukoj farataj.

Eble ne estis necese envicigi en la afiksaron la ankoraŭ ne oficialajn afiksojn — *io* kaj — *mis*, kies aplikon la Akademio ĝis nun ne decidis.⁽¹⁾

Mi ne dubas, ke la komunista laboristaro ĉerpos grandan utilon el la praktika libro“ — G. Ajul.

Parolis senpartia recenzisto. Nun aldone mi nur gratulu niajn kdojn J. Habert kaj *Marc Elbo* — riske ofendi ilian mode-

(1) La recenzisto de E. T. forgesas diri, ke la aŭtoroj sciigas la lernantojn pri la neoficialeco de tiuj afiksoj.

stecon mi citas la nomojn de la verkintoj — por la granda servo, kiun ili faris al la Revoluciularo, donacante al ĝi la frukton de sia sperto kaj persistema laborado.

Tra la mondo. Internacia legolibro kolektita kaj prilaborita de PAUL BENNEMANN. la parto: Por komencantoj. Kun multaj bildoj kaj muziknotoj. Formato: 14 × 22 cm. 96 pĝ. Prezo: 10.— M. — Eldonita de *Ferd. Hirt & Sohn*, Leipzig.

Jep malmultkosta, bona kaj tute rekomendinda libro, kiun ĉiu nova esp.isto uzos kun profito. Ne nur komencantoj povas profiti je tiu verko, sed ankaŭ multaj malnovaj esp.istoj, pro la instrua valoro de la enhavo. La libro, bele presita, ilustrata de artaj bildoj estas preskaŭ tute senpresera.

Nova Tempo - Libretaro. *Unua Kajero*. Austria Kolekto de legindaj rakontetoj, fabloj, ktp. Formato: 12 × 19 cm. 32 pĝ. Prezo: aŭstr. Kr. 30; germ. M. 3; sv. fr. 0,30. Eldonejo Nova Tempo. Wien VI, Mollardgasse Nr. 55 — Aŭstrio.

Babiladoj de Bonhumora Zamenhafano originale verkita de J. ŠAPIRO. Formato: 10 × 17 cm. 44 pĝ. Prezo: respondkuponoj afranke. Havebla ĉe *Pola Espo Servo*, Kordeckiego 1, Biłgoszcz (Polio).

Ĉu la Kulturistaj Nacioj bezonas kristanisman? Mediteroj notitaj de H. SALOKANNEL. Formato: 11 × 18 cm. 16 pĝ. Prezo: 3 respondkuponoj. Vendata por la bono de blindaj esp.istoj. Havebla: O. Y. Movado A. B., Kasarmisek 20, Helsinki (Finnlando).

Bonhumoraj Rakontoj el la Hungara literaturo (Rekomendita de Esp. L. A. Asocio). Formato: 11 × 15 cm. 32 pĝ. Prezo: germ. M. 2.30; fr. fr. 0,50; sv. f. 0.20. Havebla ĉe Paul Balányi. Budapest VI, Hajos u. 15.

Mondo kaj Koro. Poemoj de K. de KALVESAY. Formato: 11 × 15 cm. 32 pĝ. Prezo: sv. fr. 0.25; germ. M. 3, ŝil. 1/2; Havebla ĉe la supra adreso.

GAZETOJ

Memornoto. — 1) *Gazetoj tute en esp.o.* — Belga Esp.isto. — Ĉeĥoslovaka Gazeto. — Esperanto. — Esperanta Finnlando. — Esperanto Triumfonta. — Hispana Esp.isto. — Esperantista Junularo. — Hungara Esp.isto. — Katolika Mondo. — Kataluna Esp.isto. — Kristana Espero. — La Eklezia Revuo. — La Progreso. — La Esp.isto. — Literaturo. — La Unuigita Tuthomaro. — Nova Tempo. — Tagiĝo. — Verda Utopio. — Vegetarano.

2) *Esp. Gazetoj dulingvaj.* — Agitanto (Kronstadt). — Arguso (Meksiko). — Argentina Esp.isto (Buenos Aires). — Amerika Esp.isto (Boston). — Bizantio (Konstantinopolo). — Brazila Esp.isto (Rio de Janeiro). — Bulgara Esp.isto (Sofia). — Der Arbeiter-Esp. (Hannover). — Esp.Enformilo (Petrograd). — Esp. Katolika (Nederlando). — Esp.o-Praktiko (Berlin). — Franca Esp.isto (Paris). — Germana Esp.isto (Dresden). — Hina Esp.isto (Shanghai). — Internacia Komerca Revuo (Zürich). — Komunist-Esp.isto (Lisboa). — La Espero (Stockholm). — La Marto (Bohemio). — L'Esperanto. — La Semisto (Hispanio). — La Patrje Ladine (Bologna). — La Rejna Stelo (Strasburg). — La Revuo Orienta (Japanio). — La Verda Ombro (Japanio). — La Voĉo de la Popolo (Ĉinio). — Le Monde Esp.iste (Paris). — The British Esp. (London).

3) *Gazetoj favorantaj esp.on.* — *Avanguardia* (Roma, komunist). En la n^o 40, ĝi enpresas tradukon el la antaŭparolo, kiun

verkis H. BARBUSSE por fr. esp. lernolibro. — *La Voce Comunista* (Milano) n^o 33, artikolo sur la unua paĝo pri S. A. T. — *L'Étincelle* (Bruxelle) n^o 6, poresp.a artikolo de E. HAINE. — *La Revue des Primaires* (Marseille) n^o 9–10, artikolo de Moreno. — *Die Neue Welt* (Komunista, Mülhausen) n^o 25, artikolo de Bohin. — *La Voce del Popolo* (revolucia, Trentino) n^o 17, enhavas la tradukon de la artikolo de L. REVO aperinta en S. R. — *Leipziger Volkszeitung*, n^o 196, enhavas raporton pri la kongreso de S. A. T. — *Le Chretien Libre* (revolucia, Melun, Francio). En ĉiu n^o enhavas artikolojn por esp.o; publikigas kelkfoje artikolojn en esp.o. — *Bokbinder Tidende* (sindikata, Kristiania) enhavas esp.an fakon. — *The Plebs*, monata revuo (revolucia, London), enhavas ofte poresperantajn artikolojn de nia k^{do} M. STARR kaj regule esp. fakon. — *Revolt* (socialista, Kristiania) n^o 24, artikolo pri S. A. T. — *Rudé Právo* (komunista, Praha) n^o 278, enhavas raporton pri la kongreso de S. A. T., represas la prikongresan leteron de H. BARBUSSE; la n^o 239 enhavas artikolon pri esp.o-ido. — *Travail* (komunista, Bordeaux) notetoj pri esp.o de nia k^{do} DUFAU. — *Workers Dreadnought* (komunista, London) enhavas esp. kurson. — *L'Avant-Garde* (komunista, Genève) artikolo de L. REVO pri la Praha kongreso.

— *Świat Pracy* (socialista, Varsovio). Enhavas regulan esp.an fakon redaktata de k^{do} K. DOMOSLAWSKI. — *Esope* (organo de la Internacia Federacio de la Artoj Beletistikoj kaj Sciencoj, Paris) uzas esp.on por diversaj komunikoj.

4) *Idistaj.* — Bulletin Francais-Ido. — Mondo (Stockholm). — L'Amiko Idista (Francio). — Suisian Idisto (Zürich). — L'Edukero (Paris).

Diversaj. — Internacia Lingvo Esperantida (Bern). — Academia pro Interlingua (Torino).

Sennacieca Asocio Tutmonda

23, Rue Boyer, Paris-XX^e

OFICIALA INFORMILO

Celo: Utiligi praktike la internacian lingvon Esperanto, por la klasaj celoj de la laboristaro tutmonda (vidi la statuton).

Jarkotizo: Laŭ valoro de unuhora salajro meza = Anglio, 17 pencoj; Aŭstrio, 42 kr.; Belgio kaj Francio, 2,50 fr. fr.; Bulgario kaj Rumanio, 8,50 lev; Ĉeĥoslovakio kaj Jugoslavio, 7 kr.; Danio, Norvegio kaj Svedio, 1,70 kr.; Germanio kaj Finnlando, 7 Mk.; Hispanio, 2 pes; Hungario, 17 kr.; Italio, 3,40 lir.; Nederlando, 0,85 Guld.; Polio, 85 Mk.; Svisio, 1,70 fr. sv.; Usono, 35 cend., k. t. p.

Membreco kaj jarabono al «Sennacieca Revuo»: Multobligu la tarifon de membro per 4. — Ekz.: en Germanio, membro pagas 7 Mkg., membro-abonanto 28 Mkg.

(La landoj, kies monkurzo estas malfavora rilate al franca franko, pagu prefere per naciaj monbiletoj, en registritaj leteroj; la aliaj laŭvole.)

*

Je la Kongreso, la membraro de S. A. T. sumis proksimume 400; hodiaŭ (1 decembro) ni enregistras la 651-an aniĝon. Tiu cifero ilustras la situacion plibone ol iu ajn raporto. 250 aniĝoj dum 3 monatoj estas rapida ascendo, kaj nenio aŭguras baldaŭan malpliigon de tiu akcela varbado; male, pliintensigas la fervoro de niaj pioniroj, kaj ĉie estiĝas novaj fokuso de S. A. T. anoj. Esperplena estas la estonto.

651 membroj!, jes tio estas jam grava, sed ne sufiĉa. Ni daŭre penadu por ke, antaŭ la fino de la 1922^a jaro, tiu cifero triobliĝu, kvarobliĝu... Tio estas ebla, eĉ facila: aŭ propagandu por S. A. T. ĉie kaj ĉiel, letere kun siaj korespondantoj parole kun la kursanoj, — ĉiu demonstren en sia loka grupo la utilecon de S. A. T. — ĉiu traduku iujn artikolojn de nia presorgano kaj ilin aperigu en nacilingvaj gazetoj — k. t. p. Neniama allasu okazon propagandi por S. A. T. Ni Varbu. varbu: jen estas nia nuna devo.

Inter la 250 novaj aniĝoj ni citu la 9 membran grupon de Bruxelles (adr.: K^{do} Van Aelst, 107 rue Emile Ferron, *St Gilles-Bruxelles*), — 13 membran grupon de Köln (K^{do} Petersen, H., Moselstrasse 18, *Köln*, Germanio), — 9 membrojn en Köln-Dellbrück (K^{do} Rosenthal, P., Hauptstrasse 168, *Köln-Dellbrück*, Germ.), — 6 membrojn en Nürnberg (K^{do} Gerber, G., Allersbergerstrasse 57II, *Nürnberg*, Germ.), — K^{do} Lange, H., Dammweg 6, *Gröba bei Riesa*, Sachsen, (Germ.) transsendis ankaŭ 9 aniĝojn, — 11 en Plaŭen (K^{do} Hugo Adolph, Leissnerstrasse 61, *Plaŭen i. V.*, Germ.), — 8 pere de K^{do} Georg Paatz, Hahnstr. 53, *Stuttgart*, Württbg., (Germ.), — 7 de K^{do} Storch, Rudolf, en *Krockwitz bei Bodenbach* (Ĉekosl.), — 3 de K^{do} R. Friedrich, Robertstr. 6, *Eilenburg* (Germ.).

La grupoj de Dresden, Leipzig, Strassburg, Paris, Frankfurt, akiris novajn anojn. Izoluloj en Chicago, Philadelfia, Varzovio, London, Chemnitz, Magdeburg, Tormia (Italio), Eskilstuna (Svedio), Rotterdam, Aleksandrio (Egiptio), k. t. p.

*

Post la 31 Januaro 1922, ni ne plu akceptos presendaĵojn por nia 1^a Jarlibro.

La adreso de ĉiu ano estos *senpage* enpresata en la «oficiala» parto de la jarlibro, sed kiuj deziras enpresigi sian adreson en la «koresponda» parto, tiuj devas pagi laŭ la jena tarifo: la adreso kaj ne pli ol 10 vortoj = valoro de jarkotizo de S. A. T. (vidi supren), — kaj por ĉiu plua deko da vortoj = 2/3 el jarkotizo — Pri eventualaj reklamoj sin turni al Sekretario.

*

La kandidatoj al nova Komitato (konforma al plano de sektoroj) devas tuj sin deklari al sekretario, kiu sendos al il «demandaran formulon».

*

Ni insiste ripetas nian demandon „Kiu grupo de Mezeŭropo (Germanio, Ĉeĥoslovakio, k. t. p.) akceptos la taskon organizi nian duan Kongreson?”

Municioj ricevitaj por Sennacieca Revuo

(de 1 ĝis 30 Novembro)

Anglio: K^{do} Yelland, 7 fr., K^{ino} Limouzin 7 fr. — Argentino: Barrot 0,75. — Belgio: Cormau 2,45. — Francio: Trouillard 5, C. Charvolin 6,—, Desrut 1,—, Nicolet 1,—, R. Tyrco 5,—, Oswald 1,—, Sinpak 1,—, Voisin 1,—, Farnault 11,—, Lafargue 1,—, Boubou 5,—, Firmo Esp. o 1,—, A. Panlou 3,—, Raulin 3,—, S^{ino} Langlet 1,—, F^{ino} Picard 1,—, R. Louis 1,—, Grumaud 1,—, Hamon 1,—, Dutertre 2,—, Banville d'Hostel 1,—, J. Habert 10,—, Glodeau 5,—, E. Lanty 10,—, P. Gabory 1,—. — Germanio: Nonenmann kaj Martini 6 Mk., Schinkel 4 Mk., Paatz 7 Mk., Ch. Meyer 12 Mk. — Svisio: Humberstet 11 fr.

Ope = 107,20 fr. fr. kaj 29 Mkg.

XIV UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO EN HELSINKI — HELSINGFORS, FINNLANDO

la 6—12 de aŭgusto 1922

Unua kaj dua komunikoj (Mallongigitaj)

Adreso. La oficiala poŝta adreso de la Kongreso kaj de L. K. K. estas: XIV:a Kongreso de Esperanto, Helsinko (aŭ Helsingfors), Finnlando. Ĉiuj korespondaĵoj, koncertantaj la kongresajn aferojn, ankaŭ mensejoj, estu adresataj nur al tiu adreso. Telegramadreso estas: Esperanto, Helsingfors.

Aliĝo. Samideanoj, dezirantaj aliĝi al la XIV:a estas petataj uzi la aliĝilojn eldonotajn de la L. K. K. La aliĝiloj estos dum Novembro-Decembero dissendataj kun la plej multaj esperantaj gazetoj. Samideanoj, kiuj tiel ne ricevos la aliĝilon, petu ĝin de la L. K. K.

La Loka Kongresa Komitato de la XIV^a

DIVERSAĴOJ

Pri mondmigrado

Estas aprobinde fari mondvojaĝon. Sed por ke tio estu fruktodona estas necese, ke la migranto restu almenaŭ duonjaron en sama loko, antaŭ ol forkuri aliloken. Oni restu por povi bone koni la tieulojn kaj ankaŭ konigi sin al ili. Tia estas mia mondmigrada maniero.

Mi estas en Paris jam de kelkaj monatoj, kaj nun deziras forvojaĝi Rusion. Mi petas, ke oni sendu al mi salutleterojn kaj mondonacojn por efektivigi plej baldaŭ mian intencitan entreprenon. Tial ke mi ne povas konigi mian adreson, oni sendu ĉion al la Redakcio de Sennacieca Revuo, kiu kvitancos en la gazeto. — *Hungara Mondvojaĝanto.*

**

Interesa sciigo

La I-a Kongreso de la *Internacia Federacio de la Arto, Beletristriko kaj Scienco* okazos dum pasko en *Bruxelles* (Belgio). La esp-istoj ĉeestu multnombre tiun Kongreson. Ili havos tie bonan okazon por propagandi sian lingvon.

Ĉiuj inform — kaj aliĝpetoj devas esti adresataj al nia S-ano *Banville d'Hostel*, direktoro de „Esopo”. Adreso: 38 bis rue Fontaine Paris (9^e).

**

Por Blinduloj

S-o John Merchant, Vic-Prezidanto de *Brita Esp. Asocio*, sendis al la Redakcio de ĉiuj esp. gazetoj longan artikolon, kiun ni ne povis enpresi pro manko de loko. Ni nur sciigu nian legantaron pri la subteninda entrepreno pritraktata en tiu artikolo. Temas trovi 3.000 spemilojn por eldoni „*Esperanta Ligilo*”, gazetoto por blinduloj. Ĉiun monoferon oni sendu al S-o *W. Perczyn, Merrick, Woodleigh, Shepperton* (Anglio).

KORESPONDADO

TARIFO: Unu enpreso, 0 fr. 75. — Tri enpresoj, 2 fr.
Dek-du enpresoj, 6 fr.

MALLONGIGOJ: L = *letero*. PK = *poŝtkarto*. PI = *poŝtkartoj ilustritaj*. PM = *poŝtmarkoj*. bfl = *poŝtmarko sur bildflanko*. k.ĉ.l. = *kun ĉiuj landoj*. Esp-aĵo = *Esperantaĵo*.

Ĉiuj petantoj pri korespondado havas la devon nepre respondi almenaŭ unu fojon al ĉiuj petoj koncernantaj la fakon, por kiuj ili sin enskribigis.

Francio. — K^{do} *Chang Yuin*, Institut franco chinois, Fort St Irénée, Lyon, PK, k.ĉ.l.
Studenta Esperantista societo, Institut franco chinois Fort St Irénée, Lyon, k.ĉ.l.
K^{do} *Hiltbrunner, Francois*, Cité Robert, n° 12, Trojes (Aube), L., PK, k.ĉ.l.

Bulgario. — K^{do} *Mihail Agraron*, str. Saborna 58, Plovdiv, L, PI, PK, k.ĉ.l.
K^{do} *Gavrail Savov*, Str. „Saborna“ N° 37, Plovdiv. L. pri komunista junulara movado.

Siberio. — *D. Petroviĉ Burkin*, Novaji N 18, Omsk, K.ĉ.l., interŝanĝas Kolĉalka kaj Sovjeta papermono.
K^{do} *Nikolao Ivanov*, 110 Puŝkinskaja, Barnaul pri skoltismo, k.ĉ.l.

Germanio. — *Oskar Grimm*, Esslinger Str. N° 39, Untertürkheim-Stuttgart, kun laboristoj; sportemuloj, k.ĉ.l. precipe Rusio, L, PI.
August Scheel, Rotestr. N° 9, Untertürkheim-Stuttgart, kun militinvalidoj, c.ĉ.l., precipe Usono, Francio kaj Anglio, L, PI.
K^{do} *Josef Gaab*, Hohlstr. 16, ptr., Weisenau bei Mainz a. Rh., SAT.ano; p. k. il., — p. mk., k.ĉ.l., — nepre respondas, sendu p. mk., en registrita koverto.

Rusio. — K^{do} *Lazaro Abramoviĉ*, Ĥarĵkovskaja n° 65. Baĥmut, L, PK, k.ĉ.l.
K^{do} *M. P. Bokarov*, p. o. *Karakim*, orlov gub. L, pri ĉiuj temoj.
K^{do} *Vjaĉeslov Vasljekiĉ Kalaŝimikov*, Nijnij-Novgorod, Gruzinskij per. 6 kv. 6.
V. V. Varankin, Nijnij-Novgorod, Stadensja 53.
K^{do} *Ivanov Voznesensk*, gub. Konstantinova al J. Jolev, L, PK, k.ĉ.l.
K^{do} *Aleksandr Kōĉkin* (14-jara) gubernio Viatka, urbo *Urfum*, Revolucionnaja str. n° 4. L. pri disvastigo de esp.o kaj pri naciaj moroj kaj vivmanieroj.

Atentu pri la adresoj!

Ĉion rilatan al la Redakcio oni adresu jene: *Sennacieca Revuo*, 24, Boulevard Beaumarchais, Paris XI.

Ĉion rilatan al Administracio: L. Glodeau, 177, rue de Bagnolet, Paris XX.

Ĉion rilatan al S. A. T.: *Sennacieca Asocio Tutmonda*, 23, rue Boyer, Paris XX.

Kiam oni bezonas sciigi ion samtempe al 2 aŭ al 3 fakoj, oni povas enfermi la leterojn en unu sola koverto, sed tiaokaze oni uzu apartan paperfolion por ĉiu fako. Tio tree faciligos la laboron nian. — Kvankam la gazeto estos presata en Leipzig, la Administracio estas ankoraŭ en Paris; sekve nenion sendu al Leipzig.

AL NIAJ ABONANTOJ

Ni petas ĉiujn abonantojn kiuj estas informitaj de nia administracio pri finiĝo de sia abono, bonvolu kiel eble plej baldaŭ sendi sian reabonon por eviti al si interrompon en la ekspedo, kaj al ni senutilajn klopodojn.

Presejo: UNS-PRODUKTIVGENOSSENSCHAFT, LEIPZIG.

JUS APERIS:

Cours Rationnel et Complet
d'Esperanto

Préface de HENRI BARBUSSE

Eldonita de:

Fédération Espérantiste Révolutionnaire
23 bis, Rue Morère, PARIS, 14^e

Ĉiu franclingvano instruanta Esperanton devas nepre uzi tiun lernolibron.

Formato: 13 × 20 cm., 208 paĝoj
Prezo: 5 fr. francaj (Afranke: 5 fr. 50)

JUS APERIS:

la unua volumo de nia literaturo:

Tri Verkoj de Tolstoj

El rusa lingvo tradukis J. M.
(Korektita kaj aprobita de Literatura Esperantista Asocio)
Kun portreto de la aŭtoro
kaj antaŭparolo de ROMAIN ROLLAND

82 paĝoj.

PREZO AFRANKE: 1,50 franca franko por landoj kurz-suferantaj rilate al franca franko.
Por anoj de S. A. T. nur 1,10 fr. fr.
3 francaj frankoj por Francio kaj ceteraj landoj — Por anoj de S. A. T. 2,25 fr. fr.

(Pagebla prefero per monbiletoj aŭ bankĉekoj.)
Havebla ĉe S. A. T., 23, rue Boyer, PARIS (XX^e)

„La marto“

Oficiala organo de la ligo de Germanaj Esperantaj Societoj en Ĉeĥoslovakio.

Aperas ĉiumonate la 20^{an}

Estas bone redaktata.

Enhavas koncernajn, sciemajn kaj porperfektigajn artikolojn.

Kostas jare 16 K ĉ, por eksterlando 20 respondkuponojn (aŭ monbiletoj samevaloraj)

Adr.: LA MARTO, Haida, Bohemio.

Mendu viajn librojn ĉe nia librejo (petu katalogon)

Ĉiu klaskonscia kaj konsekvenca esperantisto devas anigi S. A. T.!
Petu la novan statuton.